

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Ĝenerala konsulo de
Pollando respondas
Esperanto denove
ĉeestis en Krynica
Italio: Universaleta
Kongreso en Lignano
Nia junularo kongresis
sur la Insulo de Libero
Festo! Festo!! Festo!!!
ETA ne plu atakos!
Pri la sociaj retejoj
16a paĝo el la historio
de la Sukcena Lando
“Rusa Antologio”:
Fjodor Tjutĉev
Giorgio Silfer pri
“Sur kampo granita”



2010

10

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №10 (192)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2011

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №10 (192).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто. Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 20 сентября 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

Lastatempe oni ofte legas alarmajn informojn pri la membroŝrumpo en Esperantujo. HeKo sciigis, ke SAT en 2009 havis 489 pagintajn membrojn, plus 276 al kiuj la membreco estis donacita. UEA per siaj Gazetaraj Komunikoj (GK) regule informas pri sia membraro, malrapide reduktiĝanta. Pli rapide falas la membraro de TEJO, kaj *Libera Folio* atentigis, ke dum 12 jaroj la nombro de individuaj membroj de TEJO duoniĝis, kaj ke fine de aŭgusto ĉi-jara ĉi tiu nombro estas nur 316.

Falas ankaŭ la abon-nombroj. Tamen, nek HeKo, nek GK, nek la *Folio* menciis, ke la eldonanto de *Spegulo* decidis ne plu eldoni ĝin en 2011 “ĉefe pro la malgranda nombro da abonantoj...”, kiu “neniam superis centon”.

Andreas Künzli, la ĉefa aŭtoro de *Spegulo*, responde al nia demando, skribis:

“Por la financoj oni certe estus povinta trovi solvon, despli ke ne temis pri grandaj sumoj. Krom tio indas laŭ mi priservadi ankaŭ malgrandajn abonantarojn, kiuj formas niĉojn en la Esperanto-movado, kiujn necesas subteni, fleĝadi kaj evoluigi. Per la ĉesigo de tiaj revuoj oni detruas tiujn niĉojn kaj denove aperos vakuo, aŭ truo”.

Nu, oni scias, *kial* eblas pluvivigi *Spegulon* — temas pri “afero butikita”. Sed *kial* oni pluvivigu ĝin?

Spegulo staris sur kvar kolonoj. La unua estas kritiko de nia movado, precipe de UEA: strukturo, funkciado, elektoj, UKoj, financo, kaj eĉ la “reganta koterio”. Ĉu aboni gazeton, kiu kritikis Esperantujon sen montri la pozitivan agadon de, ekzemple, UAM en Poznań, ICH en Herzberg, universitata instruado en Ĉinio, E@I kaj *Vinilkosmo* (por menciis nur kvin)?

La dua estas historio. *Spegulo* ofte publikigis tekstojn de/pri Zamenhof, multaj el kiuj (re)aperis ankaŭ aliloke. Sed pluraj abonantoj jam legis ilin (ja *Spegulo* celas inteligentan publikon). Ĉu aboni gazeton por relegi malnovaĵojn?

La tria estas senmaskigado de “kanajlaj” ŝtatoj kaj reĝimoj: Ruslando, Barato, Ĉinio, Brazilo, Vjetnamio, Kubo, Mongolio... *Spegulo* ne atentis, ke nia lingvokomunumo estas modere idealisma kaj simpatianta kun la ŝtatoj (eks)socialismaj kaj triamondaj. Inter ni ne multas admirantoj de la usoneca vivostilo kaj de la kapitalisma ekonomio. Ĉu piloriado de Fidel Castro kuraĝigos al abono tiujn esperantistojn, kiuj memoras lin kiel soldaton de Esperanto?

La kvara estas kulturo. Sed, se en la unuaj tri sferoj *Spegulo* estas preskaŭ senrivala, en la kultura ĝi konkurencas kun *Literatura Foiro*, *La Gazeto*, *La KancerKliniko* kaj, precipe, kun sia samaĝulo *Beletra Almanako*. Laŭ la eldonanto de *BA*, jam vendiĝis pli ol 550 ekzempleroj de la unua almanako kaj centoj de ĉiu el la postaj. Ĉu aboni gazeton pro kelkaj kulturpaĝoj kvar fojojn jare, dum en la pli alloga poligrafie *BA* estas pli ol cent paĝoj kulturaj tri fojojn jare?

Ĝis nun nur 80 personoj diris “jes” responde al la kvar supraj demandoj. Tro malmulte por plu investi tempon, forton kaj monon. La eldonanto rezignis...

AIKO

Aŭtoro venas al Baltio... Tion atestas foto farita de Sakari Kauppinen en la malnova urbo Paide (mezepoke: Weißenstein), kiun la finnlanda grupo vizitis dum la Aŭtunaj Tagoj de EAF, unuafoje okazinaj en Estonio (vd. p. 12).

Esperanto, rekta vojo al amikeco

Ĝenerala Konsulo Gołkowski respondas

La nova Ĝenerala Konsulo de Pollando en Kaliningrado Marek Gołkowski finis studojn pri la pola filologio en la Varsovia universitato en 1982. Instruis la polan lingvon al alilandanoj, kunaŭtoris lernolibron. Laboris kiel konsulo pri kulturo en la Ĝenerala Konsulejo de Pollando en Minsko. Estis direktoro de la Pola Instituto en Minsko, fakestro en la konsula departemento de la ministerio de eksterlandaj aferoj, vicdirektoro de la departemento de promocio kaj turismo, direktoro de la Centro de la Pola Turisma Organizaĵo en Romo. Antaŭ la alveno al Kaliningrado li oficis en la Pollanda ambasado en Moskvo kiel konsilisto en la rango de ministro.

LO: Kial vi elektis karieron de diplomato?

MG: Hazarde. Okazis en Pollando la revolucio de 1989, necesis ŝanĝi personaron en diplomatio. Necesis trovi homojn, kiuj povus tuj anstataŭi spertajn diplomatojn. Homoj estis serĉataj, unuavice, en universitatoj. Multaj universitatanoj venis al diplomatio tiumomente. Tiam mi havis 33 jarojn.

LO: Kiel vi taksas vian laboron en Kaliningrado, kompare kun la laboro en Minsko kaj Moskvo?

MG: Ĝi estas tre agrabla. Kaliningrado estas la plej bona loko, inter ĉiuj en kiuj mi laboris. Mi ĝojas, ke mi povas uzi ĉiujn eblecojn, kiujn mi havas, kaj la sperton akiritan dum jaroj. Ĉi tio tre helpas al mia laboro en Kaliningrado.

LO: Ĉu vi vizitis Kaliningradon antaŭe?

MG: Jes, antaŭ dek jaroj, kiam mi laboris en turisma sfero, mi venis ĉi tien al turisma foiro. Mi venigis du junulinon kaj 1500 kilogramojn da turisma materialo. Dum kvar tagoj ni devus deĵori ĉe nia stando, sed jam en la dua tago ĉe ni restis neniu faldfolio. Tial ni havis ŝancon viziti la urbon. Tiam mi rimarkis grandan intereson al Pollando en Kaliningrado. Mi ankaŭ konstatis ĉeeston de la Kenigsberga komercista spirito en Kaliningrado, kaj plaĉis al mi, ke restis io de la malnova historio, tio gravas.

LO: Ĉu la urbo ŝanĝiĝis de tiam?

MG: Ĉiuj landoj de la orienta kaj centra Eŭropo forte ŝanĝiĝis dum la lasta jardeko. Mia filo, vizitinta Kaliningradon en 2004, veninte en 2009, ne rekonis la urbon.

LO: Antaŭ kelkaj tagoj okazis inaŭguro de la skvaro Chopin. Kiaj kromaj eventoj en la kultura sfero efektiviĝis kun la subteno de la konsulejo?

MG: Unuavice koncertoj, ligitaj al la jaro de Chopin, koncertoj de mondfamaj plenumantoj. Ekzemple, la ĵazisto Adam Makowicz, kiu ludis en la Kaliningrada

filharmonio, estas inter la plej bonaj en la mondo. En oktobro en la Katedralo okazos koncerto de nia elstara pianisto Janusz Olejniczak, la plej bona pola plenumanto de la muziko de Chopin.

LO: Ĉu via laboro estas rimarkata en la urbo?

MG: Mia laboro estas tre agrabla, ĝi donas bonajn impresojn, eblas renkonti multajn homojn. Unuavice gravas malfermiteco de kaliningradanoj, ili volas kunlabori kun Pollando. Mi konstatis tion ankaŭ lige al la skvaro Chopin. Tre multaj homoj venis al la malfermo, kaj mi esperas, ke ni ne malbonigis ĉi tiun teritorion. Kontentaj estos unuavice loĝantoj de la distrikto. Nun patrinoj kun infanoj, kaj avinoj kun nepoj venas ĉi tien, kaj ili havas lokon por ripozo en la skvaro...

LO: ... kiu plibeligis la ĉirkaŭaĵon...

MG: Mi strebas antaŭrigardi, kiel ĉio nova enkadriĝas en la malnova medio. Mi diros honeste, ke rigardante nun al la skvaro Chopin, mi kredas, ke ĉiam estis tiel. Kaj la pavimo ekzistas de la malnova tempo. Tre bone aspektas.

LO: Vi tre bone parolas ruse. Kiujn aliajn fremdajn lingvojn vi posedas?

MG: Ankoraŭ la belorusan, anglan kaj italan.

LO: La belorusan? Malofra okazo.

MG: Tute ne. Estas multaj homoj, kiuj parolas en la belorusa. Ekzemple, kun Vaclav Stankieviĉ (ĝenerala konsulo de Litovio en Kaliningrado. — LODe) mi interparolas en la belorusa.

LO: Ĉar temas pri la lingvoj, bonvolu diru vian opinion pri Esperanto.

MG: Esperanto estis kreita en Pollando de Zamenhof. Kvankam ne plenumiĝis ĉiuj liaj atendoj, ekzemple, ke ĝi estu enkondukita anstataŭ la franca, kiu estis la internacia lingvo fine de la 19a jarcento, gravas, ke formiĝis grupo da homoj, kiuj elektis Esperanton kaj uzas ĝin. Ja oni verkas eĉ poezion en Esperanto.

LO: Kiun rolon esperantistoj de



Fotis Halina Gorecka

Litovio, norda Pollando kaj Kaliningrada regiono povus ludi en la civitana kunlaboro, en evoluigo de la interkompreniĝo inter la ordinaraj homoj?

MG: Diferenco en lingvoj kreas problemojn. Iuj homoj parolas la rusan, aliaj — la polan. Vidu la teatron. La ĉefan teatron parton oni ne povas transdoni en alia lingvo. Unuflanke estas tre grandaj limigoj, ĉar rondo da homoj, kiuj okupiĝas pri Esperanto, estas malpli granda ol rondo da homoj, kiuj scias, ni diru, la polan aŭ la rusan. Aliflanke, kaj tio estas la plej grava, laŭ mi, ke vi, esperantistoj, celas al kunlaboro. Tio faciligas la unuan kontakton kaj helpas, ĉar, la homoj, kiuj interesiĝas pri io komuna — ĉu lingvo, ĉu arto — tre rapide trovas la “komunan lingvon”. Lingvon ne en la lingvistika senco, sed en la psikologia. Kaj tio faciligas kunlaboron.

Mi dirus tiel: tiuj, kiuj deziras kunlabori en la centro de Eŭropo — ruslandanoj, poloj, litovoj, germanoj — ili estas tre gravaj, ĉar ĉiu kunlaboro kreas konatiĝon. Kaj konatiĝo estas rekta vojo al amikeco. Se aperas amikeco, tio signifas, ke vi plenumas vian rolon, vastigante per la lingvo Esperanto la kunlaboron kaj amikecon en nia parto de la mondo. Tio estas tre grava. La personaj “horizontalaj” kontaktoj estas multe pli fortaj ol formalaj administraj kontaktoj.

LO: Ĉi tiun *Ondon* pluraj abonantoj ricevos en Poznano dum la festivalo ARKONES. Kion vi dezirus diri al ili?

MG: Mi salutas ĉiujn esperantistojn, en la tuta mondo, ĉar temas pri tutmonda intereso. Laŭ mi, Esperanto estas interesa eksperimento. Estas malfacile diri, kiel ĝi evoluos, sed mi esperas, ke tiuj, kiuj estas interesataj pri Esperanto, trovos plezuron kaj en interkomunikado, kaj en utiligo de ĉi tiu lingvo.



Gvidlinioj pri Eŭropa laboro

Jam delonge Germana Esperanto-Asocio (GEA) sentis la bezonon havi gvidliniojn pri sia lingvopolitika laboro, precipe kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en rilatoj al la politikistoj kaj instancoj de Eŭropa Unio (EU).

Antaŭ 30 jaroj multaj Esperantistoj naive atendis, ke la aliĝo de multaj pliaj ŝtatoj al EU konduku aŭtomate al pli granda atento de Esperanto kiel solvo por la komunikada problemo. El tio rezultis ofte nekunordigitaj aktivecoj de unuopaj arduloj, kiuj tamen nur malhelpis al bona renomo de la Lingvo Internacia. Intertempe dominas sobroco pri la ŝancoj de Esperanto en EU. Aliflanke oni klare subtaksas kaj foje miskomprenas la laboron de EEU nuntempe.

Tial GEA sekvis la inviton de sufiĉe tradici-plena klerigejo, Haus Sonnenberg, en St. Andreasberg, montaro Harz/Germanujo, organizi de la 10a ĝis la 12a de septembro 2010 semajnfinan seminarion pri du temoj: unue, por eksteruloj “Ĉu Esperanto kiel pontlingvo en Eŭropa Unio?”; kaj due, por aktivuloj “Kiujn gvidliniojn havu nia laboro por Esperanto en EU?” Per la unua temo GEA esperis, efiki ankaŭ en la ne-Esperantista publiko. Tamen neniu ne-Esperantisto aliĝis al la seminario, kvankam la klerigejo varbadis kiel kutime.

Por la dua temo GEA invitis s-inon Maja Tišljar gvidi la kunsidon, enkonduki en la scion pri la organoj de EU kaj ties ebloj, precipe, pri ĉio, kio rilatas al la reguloj de lingvo-uzo, kaj gvidi poste la debaton pri la dezirataj gvidlinioj. Tion ŝi suverene kaj simpatie faris.

La inviton de GEA sekvis 11 aktivuloj: funkciuloj de GEA kaj Germana

Esperanto-Junularo (GEJ), de la Eŭropa Komisiono de GEA, de Gesellschaft für Interlinguistik, de la politikaj Verduloj; sciencistoj, instruistoj, informadikistoj, studentoj, kun plej diversaj spertoj kaj konoj. Komune oni studis la tezojn de pluraj aŭtoroj, kiuj skribe komunikis siajn pensojn pri ebloj kaj febloj de Esperanto en EU.

Regis ĝojinda laborplena etoso, sen flamaj disputoj, sed kun komun-anima rezulto, kiun la partoprenantoj provis formuli kaj strukturi al sistemo de gvidlinioj, en diversaj subgrupoj:

- Ĝenerala lingvopolitiko en EU
- Esperanto en EU
- Esperanto-instruado

Certe la gvidlinioj bezonas ankoraŭ pluan poluradon kaj eble tiun aŭ jenan korekton, sed principe la tuto jam taŭgos por trovi konsenton ene de GEA kaj eble pli vaste.

Pro tiu iom provizora stato mi dume rezignas malkaŝi pliajn detalojn. La tendenco estas tamen rezigni utopiajn, laŭleĝe ne realigeblajn postulojn, ekzemple “Esperanto kiel plia oficiala lingvo de EU” ktp., sed aliflanke insisti, ke Esperanto trovu la merititan respekton pri siaj kapabloj kaj kulturaj kvalitoj. Kompletigas tion rekomendoj, ekzemple sproni interlingvikajn lekcionojn en la universitatoj kaj kursojn tie kaj en lernejoj.

Gravas plie disvastigi la komprenon, ke Esperantistoj ne volas sole politikan progreson de Esperanto, sed — per Esperanto — alstrebas pli altajn celojn, kiel samrajtecon de ĉiuj homoj kaj kulturoj, specife lingvoj. Tial malaperu la miskompreno, ke Esperantistoj celas “senforman kulturkaĉon”, kion neinformitoj foje asertas, sed la idealojn de Eŭropo, ekzemple “unueco en plureco”,

ankaŭ en multlingveco. Kaj tia Eŭropo estas por Esperantistoj nur antaŭŝtupo por mond vasta modelo.

Skribe kontribuis al la seminario ankaŭ Seán O’Riain, prezidanto de EEU, per listo de rekomendoj, kiel trakti politikistojn, precipe la Eŭropajn parlamentanojn. Ankaŭ tiu teksto trovis atenton kaj aprobon. GEA nun zorge formulos la gvidliniojn, kune kun klarigaj komentoj, por poste prezenti ilin al pli vasta Esperanta publiko.

Sub la impresoj de tiu sukcesa semajnfino la ĉeestantoj proponis, ke GEA por aktivuloj de tempo al tempo ree organizu similan semajnfinan seminarion (kaj ree en tiu tre taŭga kaj agrabla klerigejo). Fine la seminario por la GEA-membraro ankaŭ estu ekzemplo, kiel la GEA-estraro estonte uzos la pli altajn membrokotizojn por povi elspezi pli da mono por la centraj taskoj de Esperanto-organizo. Venonta seminario sekve traktu la praktikan laboron, per kiu GEA konsekvenca apliku la ellaboritajn gvidliniojn.

Rudolf Fischer

Eksa “Mondano” kunfondis partion

Laŭ informo de Ulrich Matthias, la 11an de septembro multaj germanaj gazetoj raportis pri tio, ke Aaron Koenig, eksa estrarano de la germana pirata partio, kunfondis novan islamofoban partion Die Freiheit (La Libero), <http://www.diefreiheit.org>.

Aaron Koenig estas konata kiel esperantisto pro la kantado kaj gitarludado en la Esperanto-bando *La Mondanoj* kaj pro sia propra muzika albumo *Aaron brazilumas esperante* (1989). Li ankaŭ publikigis bildstriojn en Esperanto kaj pretigis T-ĉemizon de la Germana Esperanto-Junularo.

Eine-Welt-Partei fondita

La 5an de septembro fondiĝis en Wiesbaden en harmonia, agrabla atmosfero la partio Eine-Welt-Partei (Patrio Unu Mondo). Inter la ok fondintoj estis sep esperantistoj kaj unu neesperantista mondfederisto (kiu fariĝis la unua vicprezidanto).

Pliajn informojn (fotojn, funkciulojn, definitivan statuton, oficialan bazan programon, membriĝilon) oni trovas en la germana lingvo en la retejo <http://www.eineweltpartei.de>.

La partio post nelonge registriĝos kaj ĉe la germana balotestaro kaj ĉe la urba tribunalo de Wiesbaden.

Ulrich Matthias

EEU: Forta ĉeesto en Krynica

8–10 sep okazis en la pollanda banurbo Krynica la 20a Ekonomia Forumo. Ankaŭ ĉi-jare EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) denove partoprenis ĝin kun sia propra panel-diskuto kaj pere de la informbudo.

La forumo en Krynica havas gravan signifon por la mez- kaj orient-eŭropa teritorio; ĝi estas altnivela aranĝo kun pli ol 2000 partoprenantoj, dum kiu eblas alparoli diversajn gravulojn de la politika, ekonomia kaj kultura vivo. La Ekonomia Forumo estas unika eblo prezenti Esperanton al tiuj personoj kaj videbliĝi la temon de internacia komunikado. Ĉi-foje ĉeestis, ekzemple, prezidanto de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso, prezidanto de la Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek, nova prezidento de Pollando Bronisław Komorowski, kaj prezidento de Estonio Toomas Hendrik Ilves.

Danke al la financa kunlaboro de EEU, UEA kaj ESF eblis aranĝi vere reprezentan programon kaj informadon pri Esperanto kaj lingvo-politiko. Kun tri deĵorantoj de PEJ kaj EEU-estrarano Peter Baláž nia informbudo bone funkciis. Preterpasantoj povis plenumi kvizon pri Esperanto, kiu skize prezentis al ili la lingvon; disdonitaj estis pli ol 1500 informiloj en la pola, angla kaj rusa — la oficialaj lingvoj de la forumo.

La ĉeftemo de la podia diskuto de EEU estis ĉi-foje “Eŭropo sen konfliktoj — ĉu sufiĉos nur politikaj garantioj?” La gvidanto de la diskuto estis prezidanto de EEU Seán Ó Riain. Aliaj prelegantoj kun kontribuo estis: Zbigniew Galor, Ilona Koutny kaj Barbara Despiney. La salono kun 45 homoj atente aŭskultis diversajn vidpunktojn pri la temo.

Danke al kontaktoj de PEA-prezidantino Halina Komar, Esperanto estis denove elstare prezentita en la Forumo. Agrable estis konstati, ke ne aŭdiĝis fortaj kontraŭstaroj pri la temo Esperanto. Surprize multaj estis pozitivaj reagoj kaj relative granda estis la intereso kaj scivolemo pri la Esperanto-stando. Unika kaj rara afero pri la forumo estas la eblo alparoli personojn kun altaj postenoj en politiko aŭ ekonomiko, kion ni sukcese faris ankaŭ ĉi-jare.

La estraro de EEU esperas plu aktive ĉeesti en Krynica kaj jam nun elektas temon por la venontjara forumo. Ni esperu pri pluraj similaj fruktodonaj agadoj por informado pri Esperanto.

Peter Baláž
EEU-estrarano

Gratulo al prezidento Komorowski

(GK UEA) Bronisław Komorowski, la nova prezidento de Pollando, transprenis la oficon la 6an de aŭgusto. Je tiu okazo Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller sendis al li gratulojn, dezirante al li “multe da sukceso en la plenumado de tiu respondeca tasko por la bono de Pollando kaj por la progresigo de harmonio kaj kunlaboro inter la popoloj”.

“Estis granda honoro al ni pasintjare, ke Vi akceptis esti la Alta Protektanto de la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, kiu estis la ĉefa evento por festi la 150an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto”, — skribis Buller. Li memorigis, ke la temo de tiu UK rilatis al la eldiro de Zamenhof, ke Esperanto celas krei pacan ponton inter la popoloj. Buller aldonis, ke la kongresanoj aprezis la mesaĝon de Komorowski al la UK, en kiu la Alta Protektanto referencis al tiu eldiro kaj konkludis: “La revo pri paco kaj sekureco estas aparte grava kaj signifa. La projekto krei universalan lingvon, kiu ebligu dialogon kaj kompreniĝon inter la popoloj, estas valora paŝo al la realigo de tiu ĉi revo”.

“Ekde la apero de la unua lernolibro de Esperanto en Varsovio ĝis la regule daŭrantaj Esperanto-elsendoj de la Pola Radio Via lando akiris kaj konservas specialan lokon en la koroj de esperantistoj, — daŭrigis Buller. — Kun granda ĝojo ni vidas, ke ĝuste Vi, la Alta Protektanto de nia pasintjara kongreso, nun okupas la plej altan oficon de Pollando”.



Pri lingva politiko en kastelo

Ĉu neniam okazis, almenaŭ unu fojon, ke vi bedaŭris la mankon aŭ deziris la kreon, de internacia lingvo, kiu multe pli facile skribeblas kaj prononceblas ol niaj naciaj lingvoj? Do imagu, ke tiu lingvo ekzistas: Esperanto.

Sed, kiel tio okazas al multaj el niaj samtempuloj, vi ne scias tion. Kaj vi ne scias tion, ĉar la regantoj taskigitaj pri nia morala kaj intelekta edukado ne sciigas tion al vi, cetere kun granda bedaŭro de eminentuloj kia Albert Jacquard, por citi nur tiun francon. Tiu silento kaŭzas, ke 90% de la planeda loĝantaro devas paroli la lingvon de la restaj 10%: pasintecce la latinan, hieraŭ la francan, hodiaŭ la anglan: kaj morgaŭ?

Ĝuste por denunci tiun absurdecon en la politiko de internacia komunikado kaj por malfermi la debaton antaŭ larĝa publiko, defendantoj de Esperanto grupiĝis ene de politika movado, nomata *Eŭropo Demokratio Esperanto* (EDE).

Se ne formiĝis tiu politika movado en via lando, se ne jam amaskomunikiloj mencias nian lingvon dum eŭropa balotkampanjo, malkovru nian retejon e-d-e.org kaj niajn sekciojn, serĉu niajn fortojn kaj malfortojn, ekagu!

Kvardek mil voĉojn akiris la partio EDE en Francujo kaj Germanujo en majo 2009. Tridek francaj aktivuloj kuniĝis dum la lasta aŭgusta semajnfino en la Esperanto-kastelo Greziljono (gresillon.org) por la 3a somera universitato de tiu politika movado.

Post konferencoj kaj analizoj sekvis diskutoj kaj debatoj. Filmada ateliero evoluigis nian kapablon pri publika parolo antaŭ kamerao. Legu pli en nia retejo e-d-e.org sub la dato 2010-08-27.

Guy Camy, Bert Schumann



Krynica: la podian diskuton gvidas Seán Ó Riain (P.B.)



Hanoj: Laborkunsidoj kaj medalo

Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães vizitis Hanojn de 29 aŭg ĝis 5 sep. Kun pli ol 60 aliaj gastoj el multaj landoj, ili estis invititaj de la Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj (VUAO) lige kun la 65a datreveno de la sendependeco de Vjetnamio, kiun oni festis 2 sep. En la tago antaŭ la nacia festo la gastoj estis akceptitaj de la prezidento de Vjetnamio s-ro Nguyen Minh Triet kaj ili partoprenis en la solena festo en la Nacia Kongresa Centro. La riĉa programo inkluzivis i.a. viziton al la Maizoleo kaj Muzeo de Ho Chi Minh.

Antaŭ kaj post la programo de VUAO Buller kaj Magalhães havis laborkunsidojn kun la Centra Komitato de Vjetnama Esperanto-Asocio kaj kun la membroj de la Loka Kongresa Komitato de la 97a UK, kiu okazos en la vjetnama ĉefurbo en 2012. Kvankam LKK ankoraŭ ne estas formale nomumita, ĝi jam diligente laboras. La oficistoj de UEA vizitis ankaŭ la Fremdlingvan Universitaton, en kies ejoj okazos la ĉefa parto de la programo de la 97a UK, kaj la tre modernan Nacian Kongresan Centron. Pri la perfekta taŭgeco de ĉi-lasto kiel ejo por la inaŭguro kaj fermo de la UK la oficistoj de UEA povis certigi dum la solenaĵo de la nacia tago, kiu okazis tie.

Fine de la vizito s-ro Vu Xuan Hong, prezidanto de VUAO, transdonis al Buller la medalon “Pro Paco kaj Amikeco inter la Popoloj” pro lia kontribuo al la amikeco kun la vjetnama popolo kaj al la vjetnama Esperanto-movado dum pli ol kvardek jaroj.

GK UEA

Membrofalo post Havano

La 31an de aŭgusto UEA havis 5206 individuajn membrojn; unu jaron pli frue ili estis 5607. Okazis do falo de 401 membroj. Fine de julio la minuso estis 290, sed ĝi pligrandiĝis, ĉar dum la UK kaj precipe IJK en Kubo oni kolektis multe malpli da membrokotizoj ol en la pasintjaraj kongresoj.

La nombroj en la unuopaj kategorioj estis (interkrampe 31 aŭg 2009):

MG 436 (282), MJ 1152 (1389), MJ-T 180 (272), MA 2372 (2580), MA-T 108 (118), DM 795 (798), DM-T 19 (22), DMJ 74 (68), DMJ-T 9 (12), HM 54 (59), HPK 7 (7). La junularaj kategorioj (kun la litero T) sumiĝis je 316 (424).

677 kotizoj estis pagitaj de Fondaĵo Canuto kontraŭ 726 unu jaron pli frue. Grava malkresko de donacoj kaŭzis tiun malkreskon. Plua malkresko de kanutigoj en 2011 apenaŭ estos evitebla. La granda kresko de Membroj kun Gvidlibro (MG) okazis ĉefe pro la membrigo de 112 kubaj kongresanoj en tiu kategorio.

Osmo Buller

CED kun nova estraro

La nova Estraro de UEA, elektita en Havano, komencis la elektadon de komisiitoj kaj komisionoj por plej diversaj agadkampoj. Temas pri ampleksa tasko, kiu okupos la Estraron ĝis la fino de la jaro.

Kiel la unua estis elektita la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La nova estraro de CED, kiu en la strukturo de UEA havas statuson de komisiono, konsistas el Detlev Blanke, Mark Fettes, Sabine Fiedler, Federico Gobbo, Wim Jansen, Kimura Goro Christoph, Christer Kiselman, Katalin Kováts, A. Giridhar Rao, Humphrey Tonkin kaj José Antonio Vergara. Kiel direktoro de CED plu funkcios prof. Tonkin. Flanke de la Estraro de UEA pri rilatoj kun CED respondecos estrarano Amri Wandel.

CED estas la esplora-dokumenta branĉo de UEA. Ĝiaj plej konataj aktivaĵoj estas la okazigo de Esperantologia Konferenco en Universalaj Kongresoj kaj la eldonado, kun la nederlanda firmao John Benjamins, de la plurlingva scienca revuo *Language Problems & Language Planning* kaj de la novaĵbulteno *Informilo por Interlingvistoj*.

GK UEA

Nova redaktoro de *Kontakto*

Rogener Pavinski sekvos Paŭlon Moĵajev kiel redaktoro de la revuo *Kontakto*. La Estraro de UEA konfirmis la decidon de la Estraro de TEJO, kiu elektis Pavinski post publika konkurso inter pli ol 20 kandidatoj. La juna brazilano aktivis diverskampe de pluraj jaroj. Kiel filmisto li estis kunkreinto de la filmo *Esperanto estas...* Kiel muzikisto li estis interalie voĉo de la grupo *Supernova*, kiu precipe famiĝis per siaj prezentadoj en la pasintjaraj UK kaj IJK. De 2004 ĝis 2006 li redaktis la bultenon *Momenton!* de Brazila Esperantista Junulara Organizo, kaj de 2007 ĝis 2009 li estis estrarano de TEJO.



Rogener Pavinski estis elektita kiel redaktoro por du jaroj. La unua *Kontakto* sub lia redakto estos №5 de la nuna jaro. “Mi multe dankas la konfidon, kiun la TEJO-estraro havas je miaj kapabloj, — li diris post sia elekto. — Mi strebos doni novan vivon al la revuo kaj labori, por ke ĝi estu pli alloga, kultura kaj freŝtema. Mi planas multajn novaĵojn kaj invitas la esperantistojn partopreni en la kreado de la nova *Kontakto*”.

Kontakton ricevas ĉiu individua membro de TEJO. Ekde 2011 ĝi enhavos ankaŭ la bultenon *TEJO tutmonde*, kiu ĉesos aperi kiel aparta eldonajo. Oni povas aboni al *Kontakto* ankaŭ aparte.

Favora ebleco por kluboj, kursoj k.a. estas kolektiva abono de minimume ses ekzempleroj. Se ĉiuj ekzempleroj estos sendataj en unu pakaĵo al la sama adreso, oni ricevas rabaton de 40% el la plena abonprezo; se la numeroj estos sendataj rekte al la unuopaj ricevantoj, la rabato estas 20%.

GK UEA

Universaleto Kongreso en Lignano

Ĉio devas ŝanĝiĝi por ke ĉio restu sama. La ĉi-jara itala Esperanto-kongreso estas praktika apliko de ĉi tiu frazo el la itala romano *La leopardo*. La senco de tiu frazo en ĝia kunteksto estas, ke en difinitaj momentoj ĉio devas renoviĝi, por povi pludaŭri en la novaj sociaj kondiĉoj. La itala nacia kongreso de Esperanto havis siajn ekzistoproblemojn, kiel la kongresoj de aliaj eŭropaj landaj asocioj. En la cent jaroj de la ekzisto de nia Federacio, la plej bona periodo por la naciaj kongresoj estis la 1950–60aj jaroj.

Intertempe ĉio ŝanĝiĝis ĉirkaŭ ni. La vivo-ritmo iĝis pli freneza, pro kio malfacile homoj povas dediĉi tutan semajnon al Esperanto-kongreso. Tion pruvas cetere la evoluo de kongresoj ankaŭ en Germanujo, Francujo, Nederlando, ktp. Ili reduktiĝis al kelkaj tagoj (iom pli longa semajnfino) kaj foje eĉ al nur unu posttagmeza Ĝenerala Asembleo. Ankaŭ la itala kongreso en la lastaj jaroj emis reduktiĝi al kvar tagoj. Kvin tagoj estis jam la escepto, dum multaj kongresanoj ĉeestis nur la sabaton kaj la dimanĉon.

La ekonomia situacio, se ni devas fidi je la statistikoj, pliboniĝis daŭre dum la lastaj 50 jaroj. Malgraŭ tio la persona percepto de la homoj estas, ke nun ĉio estas pli multekosta kaj pli malfacile akirebla. Se nun familio devus veni al Lignano (Prononcu: Linjano) el Romo per la vagonaro kaj resti tie dum unu semajno en hotelo, la elspezoj iĝus neelteneblaj aŭ almenaŭ sufiĉe pezaj por mezklasa familio.

Eble pro tio ankaŭ homoj, kiuj ne plu estas junaj, serĉas solvojn junularajn, kaj la aranĝoj de nia junulara sekcio iĝas ĉiam pli popularaj. La lastatempa ĝenerala krizo estas nur unu plia faktoro. 6 italoj je 10, ree laŭ la statistikoj, ne ferias ĉi-jare. Inter ili certe estos ankaŭ esperantistoj.

La entuziasmo pri la baldaŭa fina venko malpliĝis samtempe kun la falo de la ideoj pri finaj venkoj en pli ĝeneralaj kampoj. Socialismo mortis kaj kapitalismo ne fartas tro bone. Nun restas la espero eviti la malaperon de la planedo.

Samtempe kun la falo de tiuj “mesiaj” esperoj ankaŭ la fido je la triumfo de la bonuloj (esperantistoj) kontraŭ la malbonuloj (favorantoj de imperiaj lingvoj) malpliĝis. Finfine nur en filmoj ĉiam gajnas bonuloj. Ĉi tiu

estas problemo pli ĝenerala kaj pli grava. La emo resti izolita kaj pensi nur pri propraj aferoj estas pli kaj pli ĝenerala, kaj pli kaj pli ofte oni ekscias pri ekzisto de esperantistoj, kiuj ne volas paroli kun aliaj vivantaj homoj sed nur kun sia komputilo. Tiuj certe ne venas al kongresoj.

Sed, kiel antikvuloj bone sciis, nenio vere mortas en la mondo sen samtempa naskiĝo de io nova. La nova mondo konsentas pli amasan lernadon de Esperanto ol iam ajn antaŭe en la historio. La kvanto da homoj, kiuj lernas nun Esperanton per la reto, estas impresa. Evidente ili ne plu sentas emocian ligan al sia loka instruisto kaj loka grupo, por ne paroli pri sia landa asocio. Ili principe ne emas veni al kongresoj, sed se oni informas ilin kaj insistetas, ili foje venas, kaj ĉi tiu ĉi-jara kongreso pruvis tion.



Al la itala Kongreso en Lignano, apud Venecio, aliĝis 332 kongresanoj el 37 landoj, tamen kelkaj neeŭropanoj ne atingis la kongresejon ĉar ili ne sukcesis ricevi la vizon. La LKK, landa kongresa komitato, konsistis el Renato Corsetti, Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni, Nicola Minnaja kaj Boris Mandirola. Vi komprenas el tio, ke la kongreso okazis en urbo sen Esperanto-grupo.

La kultura programo havis koncertojn de Jean-Marc Leclerc, alinome JoMo, Mikaelo Bronŝtejn, Georgo Handzlik, Amir de la grupo *EspoDespo*, Ĵomart kaj Nataŝa. Tuttagaj ekskursoj estis al Venecio, Treviso kaj Triesta Karsto. Prelegoj estis de Davide Astori pri lingvistiko kaj Esperanto kaj pri homaranismo, de Katalin Kováts pri instruado, de Zlatko Tišljar pri eŭropa

identeco, kaj de multaj aliaj. Gražina Opulskienė kaj Anna Löwenstein gvidis perfektigan kaj enkondukan kursojn de Esperanto per la rekta metodo laŭ Andreo Cseh.

Partoprenis la kursojn ankaŭ naŭ junuloj, kiuj ricevis stipendion de Itala Esperanto-Federacio por ĉeesti la kongreson. Tio estas grava novaĵo. Temas pri la klopodo kunmeti la lernantojn retajn kun la normalaj esperantistoj. Pro la ĉeesto de multaj gejunuloj de la Itala Esperantista Junularo la afero sukcesis.

Michael Boris Mandirola organizis ĉiuvesperan kaj noktan interesan programon ĉefe por gejunuloj kun muzikado, dancado, ludado, gustumadoj de produktoj de la regiono kaj de la tuta Italujo kiel vinoj, fromaĝoj, dolĉaĵoj. La strandoj kaj plaĝoj apud kongresejo estis abunde uzataj por banado kaj sunbrunigado.

Apartaĵo de la ĉi-jara kongreso estis ankaŭ la KER-ekzamenoj kaj la KER-seminario, kiun mendis por siaj membroj la Itala Esperanto-Instituto. KER estas mallongigo por Komuna Eŭropa Referenc-kadro rilate al lingvoinstruado kaj ekzamenado. Gvidis ĝin Katalin Kováts kaj partoprenis ĝin ankaŭ la direktoro de la franca instituto. Dum la seminario la reprezentantoj komparis siajn landajn sistemojn kaj analizis la novan eŭropan. Oni alvenis al la konkludo, ke en la estonteco la KER-ekzamenoj havu la rolon testi lingvajn kapablojn kaj doni ŝtatnivele kaj ekstermovade utiligeblajn atestilojn, dume la movadaj ekzamenoj (landaj kaj tiu de UEA-ILEI) celu kompletigi la sistemon per movadaj kaj kulturaj partoj. Ili fariĝas kvazaŭ daŭrigoj de la KER-ekzamenoj, kies diplomon estus utile enkalkuli je la koncernaj niveloj kaj je peto de kandidatoj ebligi anstataŭigi per la KER-atestiloj la lingvan parton de la nacilingvaj ekzamenoj.

En Lignano submetiĝis al la ekzamenoj dek membroj, inter ili la tuta estraro de la Itala Instituto, kompletigante la teoriajn studojn per vera praktika mezuriĝo kun celo proprahaŭte akiri ekzamenspertojn.

Aliĝoj estis jam akceptataj por la 78a Itala Kongreso, okazonta 20–26 aŭg 2011 en Torino.

Renato Corsetti

**Ne forgesu
(re)aboni**

IJK-66 sur la Insulo de Libero

Tuj post UK-95 en Havano, 24–31 jul okazis la 66a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Santa Cruz del Norte, ĉirkaŭ 45 km oriente de Havano.

Granda kaj bela ripozejo Villa Trópico gastigis 181 partoprenantojn el dudeko da landoj. Indas menci, ke ĉi-foje temas pri la norda marbordo de la insulo, kiam lastfoje antaŭ 20 jaroj en la jaro 1990, kiam IJK kaj UK estis organizitaj en Kubo, la junularo kongresis ĉe la suda marbordo ĉe Playa Girón.

Dank' al kunlaboro de TEJO kun UEA kaj ILEI, pluraj kubanoj kaj latin-amerikanoj ricevis subvencion por partopreni la ĉi-jaran IJK, pro kio ĝi iĝis pli internacieca kaj pli latinamerika.

Konstantaj IJK-partoprenantoj povis rimarki, ke la ĉi-jara IJK rimarkindas inter multaj lastaj IJK-oj pro kelkaj kialoj.

La bela plaĝo, blua oceano, varmega vetero ne nur bone influis la humoron, sed ankaŭ influis la programon. Anstataŭ la kutima plenŝtopita programo kun samtempe paralelaj programeroj ĉi-foje la programo ŝajne ne havis la ĉefan rolon. Dum la tuta tago kutime okazis ne pli ol tri prezentoj aŭ prelegoj. Tage oni povis trovi la partoprenantojn pli facile ne en la prelegejo, sed ĉe la plaĝo aŭ naĝejo kaj trinkejo aŭ en unuetaĝaj loĝdometoj, kiuj staris sur la vasta teritorio de la ripozejo.

Tamen la vespera programo estis ĉiam abunda, ja nur vespero povis ebligi pli facilan spiradon post la varmega tago. Ĉiuvespere eblis spekti filmojn en Esperanto, preparitajn de *Verda Filmejo*, pasigi la nokton en dancejo kaj senpaga trinkejo. La Nacia Vespero kun kubaj muziko kaj dancoj, la koncerto pri Paco, kaj la Solena Fermo donis grandan impreson pri la multflanka kaj multkolora kuba kulturo. Ne nur dum UK, sed ankaŭ dum IJK furoris la juna muzikbando *Amindaj*. Freŝaj Esperanto-lernintoj ravis partoprenantojn per kantoj en Esperanto, plenaj je kuba ritmo kaj energio.

Dum la ekskursita tago la kongresanoj vizitis la malnovan urbon Matanzas, kie antaŭ UK pasis la ILEI-konferenco, kaj kavernojn de Bellamar.

La senton, ke oni trafis paradizon, subtenis la fakto, ke dum IJK oni ne devis pagi — ĉio estis inkluzivita en la sufiĉe modestan aliĝkotizon: la loĝado, trifoja manĝado, ekskursoj, naĝejoj, du trinkejoj, katamaranoj.

Aleksander Osincev



Amindaj furoris ĉi-somere en Kubo (Fotis Lukasz Żebrowski)

Nevidantoj kongresis en Vieno

10–15 jul la ĉefurbo de Aŭstrio gastigis la 76an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj. Ĉi-jaran IKBE partoprenis pli ol 70 adeptoj de la internacia lingvo el dekelkaj landoj. Neku-tima varmo ne preterpasis ankaŭ la perlon de Danubo, kiel oni juste titolas Vienon. Tamen tiu domaĝa fakto ne tro ĉagrenis la partoprenantojn.

Grava avantaĝo de ĉi-jara IKBE estis tre oportuna situo de la kongresejo, facile atingebla de Vienaj stacidomoj kaj flughaveno kaj samtempe nur je 15-minuta promen-distanco de la urbo-centro, plena de vidindaĵoj.

Lunde okazis tuttaga ekskurso al Eisenstadt — la ĉefurbo de la plej orienta Aŭstria federaciero Burgenland. Tie la kongresanoj vizitis la domon, kie loĝis la komponisto Haydn kaj la kastelon de la princoj Esterházy kie li dum multaj jaroj agis muzike. Marde oni ekskursis tra la Viena urbocentro kun vizito de la Internacia Esperanto-Muzeo. Merkrede ĉiuj kongresanoj gaje tempumis en tipa Viena vingastejo. Eĉ okazinta tiutage metropolitena kolapso, kaj sekve de tio trafika ĥaoso, ne malbonigis la humoron.

Inter la programeroj trovis sian lokon ankaŭ pli kaj malpli seriozaj aranĝoj kiel kunsidoj de LIBE, arta kaj interkona vesperoj kaj diversaj prelegoj. Tamen, antaŭ ĉio, ni ĝuis la varm(eg)an, amikecan etoson, kiu verŝajne gravas pli ol ĉiuj oficialaĵoj. Apartajn dankojn meritas aŭstria samideanoj, organizantoj kaj helpantoj de la kongreso.

Nikolaj Penĉukov

Burundo proponas federacion

Esperanto-seminario okazis 21–28 aŭg en la Bunanza liceo en la provinco kaj komunumo de Bubanza (Burundo) kun partopreno de pluraj esperantistoj kaj Esperanto-lernantoj el Burundo kaj kelkaj gastoj el Kenjo kaj Ugando.

Post la malfermo, kiun partoprenis la direktoro de la liceo kaj la komunumestro de Bubanza, komenciĝis la laborprogramo.

Dum la tuta seminario kelkaj instruistoj gvidis la kurson de Esperanto laŭ la libro *Gerda malaperis* de Piron. La jam parolantaj esperantistoj vizitis prelegojn pri diversaj aspektoj de Esperanto, ankaŭ pri la historio kaj la nuna stato de la movado en Afriko. La estraro de la landa asocio ANEB kaj la lokaj aktivuloj ĉiuvespere kunvenis por vidi, kion oni jam faris, kaj por skizi planojn por disvastigo de Esperanto en Burundo. La estraro de ANEB faris kunsidon ankaŭ kun la eksterlandaj partoprenantoj por starigi la Esperantan Federacion de la kvin najbaraj landoj (Kenjo, Tanzanio, Ugando, Ruando kaj Burundo).

En la ferma tago Jérémie Sabiyumba, la prezidanto de ANEB, dankis la organizantojn kaj la partoprenantojn pro la sukcesa okazigo de la seminario, kaj la sukcesintaj kursfinintoj ricevis diplomojn (nur kvin kandidatoj malsukcesis). Post la disdono de diplomoj, la ĉeestantoj trinkis, vespermanĝis kaj dancis.

Hasano Ntahonsigaye

Rio: Riĉa programo de SER-9

“Neforgesebla evento!” — estis la ĉefa opinio de la plimulto inter la 99 partoprenintoj de la 9a Spiritista Esperantista Renkontiĝo, okazinta 12 sep en Rio-de-Ĵanejro.

La ĉefparolinto Ismael Miranda e Silva dum unu horo prelegis pri la ĉefa temo: “Esperanto: Ilo de paco inter la popoloj”, kaj poste dum 20 minutoj respondis demandojn pri la temo.

Sekvis riĉa kultura programo. La kantisto-gitaristo Nilson Bulhões kantis kelkajn naciajn popolajn muzikaĵojn en Esperanto. La ĥoro de la Spiritisma Domo Leon Denis prezentis Esperantajn kaj popolajn kantojn. La pianistino Claudia Leite prezentis klasikajn muzikaĵojn kaj ankaŭ ludis la himnon *La Espero*. Gelernantoj de la E-Grupo *Lazaro Luiz Zamenhof* prezentis dulingve adaptitan skeĉon laŭ la poemo *La kvin ŝipdrontoj* de Silla Chaves.

Paulo Kverko

KELI: Inter ili neniu havis mankon

En la 60a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Beregdaróc (Hungario) proksime de la landlimo kun Ukrainio 2–9 aŭg 2010 kunvenis 40 partoprenantoj el 11 landoj. La Biblia temo de la kongreso estis: “Inter ili neniu havis mankon” (*Agoj* 4: 34).

La tagoj komenciĝis kaj finiĝis per komunaj preĝoj uzante la preĝ- kaj diservan libron *ADORU*. Prelegoj kaj kontribuoj de la partoprenantoj riĉigis la programon, ekzemple: pri Philippe Melancthon kaj Albrecht Dürer, Charles Darwin/Teilhard de Chardin, Ekumeno, Sören Kirkegaard, Andreo Cseh, Henk de Hoog (KELI-prezidinto 1955–1961), UK en Kubo, Ekleziaj tonaloj, Vangpreĝejo, Kantado. En muzikvespero estis prezentitaj hungaraj popolkantoj akompanitaj per citro. En la libera tempo refreŝigis nin la hotela naĝejo.

Tuttaga ekskurso gvidis nin al najbaraj vilaĝoj kun reformitaj preĝejoj kaj muelilaj muzeoj, duontaga ekskurso okazis al proksima marĉo per ĉevalĉaroj.

Du kongresanoj estis viktimoj de ŝtelistoj en Budapeŝto. La kongresanoj kun pli ol 65 jaroj avantaĝe vojaĝis senkoste en Hungario.

Pavel Polnický

Bulgario: Nova prezidanto

La 62a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio (Sopot, 3–5 sep 2010), elektis novan prezidanton: post tri sinsekvaj mandatoj Petar Todorov (iama UEA-estrarano) ne plu sidas ĉe la pinto de BEA; tamen li restas en la novelektita Estraro. Nova prezidanto estas Bojidar Leonov el Karlovo: lia (Esperanto)-altlernejo estas AIS-filio, sed ĝi daŭre atendas la agnoskon de la bulgara ŝtato.

La ĝisnuna sekretario de la asocio, Mariana Evlogieva, rezignis resti estrarano; male, la ĝisnuna estrarano Georgi Miĥalkov restas sekretario de la asocio kaj plu redaktoras la presorganon de BEA *Bulgara Esperantisto*. Vicprezidanto dum la sekvaj tri jaroj estos Maja Gorova, tre fama bulgara pentristino (filino de Ĥristo Gorov, honora membro de UEA). Estrarano restos ankaŭ Boris Gaĝanov, ĝisnuna vicprezidanto de BEA.

La kongreson ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj, inter ili gastoj el Danlando, Japanio, Korea Respubliko, Serbio, Hungario, Rumanio, Nederlando, Pollando.

HeKo



Ĉu NASKanoj ekzercas la vortkategoriecon de “komb”? (Fotis Katalin Kováts)

NASK 41

Diversaj aferoj allogis, de 27 jun ĝis 17 jul, al la 41a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) tridekon da partoprenantoj, kiuj venis el sep landoj kaj naŭ usonaj ŝtatoj.

Ĉi-jara kursaro okazis la kvaran fojon ĉe la belega Universitato de Kalifornio en San Diego (UCSD) en la suda Kalifornio. Meznivelaj studentoj studis sub la gvido de Katalin Kováts el Nederlando kaj Lee Miller el Usono. La alt-nivelaj studentoj, kies ĉefa instruisto estis Grant Goodall, profesoro ĉe UCSD, krome spertis instruadon de tri gast-profesoroj: Orlando Raola origine el Kubo sed nun usonano, Duncan Charters el Usono, kaj Amri Wandel el Israelo.

Meze de la studado, ekskursoj kaj distraĵoj, 13 partoprenantoj sukcese trapasis la novan ekzamenon de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro.

Esperantic Studies Foundation (ESF) aldonis al la diverseco de la kursaro per ties estrarkunsido samloke dum la dua semajnofino. Tri membroj de ESF — Humphrey Tonkin, Wally du Temple kaj Grant Goodall — gvidis pensindan seminarion “Esperanto: pasinteco, nuntempo, estonteco”. Studentoj profitis la okazon amikiĝi kun la gravuloj de la organizo kiu forte subtenas NASK.

Multaj el la aktivecoj de la kursaro estis bone raportitaj en la tagjurnalo *La NASKa Fasko*, redaktita de Hoss Firooznia, kiu ankaŭ gvidis la multajn ekskursojn. Oni povas legi la numerojn ĉe: <http://esperanto.org/nask>.

Ellen M. Eddy

Administranto de NASK 2010

Somera festo en Jüterbog

Kio devas okazi, ke esperantistoj el Berlino, Brandenburgio, Krimeo kaj Pollando survojiĝas por restadi kelkajn horojn en tiu pli ol miljara urbo? Oni bezonas someron, bonan etoson kaj la agemon de la gastiganta familio Langer.

Ili ja venis la 21an de aŭgusto. Unue okazis estrarkunsido de la loka asocio EABB, kaj tamen oni jam povis esplori la belan kaj grandan ĝardenon. Post multaj jaroj estis la unua Somera Festo ekster la tradicia Michendorf ĉar tie laejo kun domo ne plu estis disponebla.

Bonege la familio Langer regalis la gastojn per la plej diversaj bongustaĵoj.

Ni eksciis iomete pri la urbo Jüterbog kaj sukcesis viziti la preĝejon de Sankta Nikolao. Ĝi estas konata pro la leteroj de indulgenco, eldonitaj de Johann Tetzel. Videbla estas la “Skatolo de Tetzel”, en kiu estis kolektita la mono. Interalie, la afero kaŭzis la reformacion de la kristanismo, kiu komenciĝis per la 95 tezoj de Martin Luther, kiujn li najlis al la pordego de preĝejo de Wittenberg.

Memkompreneble ankaŭ aliaj trezoroj estis videblaj. En la urbodomo ni povis konatiĝi kun la ĉambro de la urbestro. Interesa estis ankaŭ la vizito de la urba biblioteko, kiu troviĝas en iama monaĥejo kune kun la urba muzeo, arkivejo kaj turista informejo. Tiu vizito kroniĝis per guteto de loka herba likvoro. Post la reveno, en la “festejo” ni povis ĝui bone organizitan kradrostadon.

Bedaŭrinde necesis adiaŭi de Jüterbog kaj la gastamo de familio Langer.

Grandan dankon al ili pro ĉio.

Ronald Schindler

EKNIMĈ-6: Instrui kaj apliki

(ĈIIC) 21–22 aŭg en Liaodong-instituto en Dandong (provinco Liaoning) okazis la 6a Esperanto-Kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio (EKNIMĈ) kun temo “Instruado kaj Aplikado de Esperanto”.

Partoprenis 155 esperantistoj el Ĉinio kaj kvar alilandanoj: prezidanto de Komisiono pri Azia Movado (KAEM) Teruhiro Sasaki, eksprezidanto de KAEM Hori Yasuo (ambaŭ el Japanio), eksvicprezidanto de ILEI Ronald J Glossop el Usono kaj Ebla el Korea Respubliko.

Invitite ĉeestis la kongreson Yu Tao, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), Tan Xiuzhu, prezidanto de kontrola komisiono de ĈEL, Zhang Wei, estro de Liaoning-universitato, Yang Luping, konstanta asista prezidanto de Liaoning-a Federacio de Soci-sciencaj Rondoĵoj, Lu Jichen, vicdirektoro de Liaodong-instituto, Zhao Jianping, direktoro de la Esperanta sekcio de Ĉina Radio Internacia kaj veteranaj esperantistoj de Ĉina Esperanto-Ligo, *El Popola Ĉinio*, Ĉina Radio Internacia kaj aliaj Esperanto-organizoj.

Yu Tao en sia inaŭgura parolado alte taksis la Esperanto-movadon de la nordorienta Ĉinio kaj kuraĝigis esperantistojn en tiu regiono multe kontribui por disvastigo de Esperanto. Liu Zhengkun, prezidanto de la Liaoning-a Esperanto-Asocio, faris labor-raporton pri la agado de la Esperanto-asocioj en Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio.

Teruhiro Sasaki bondeziris al la kongreso, kaj Hori Yasuo esprimis sian bedaŭron pro la invad-milito de Japanio al Ĉinio antaŭ pli ol 60 jaroj, li alte taksis la energion kaj gravan rolon de la ĉina Esperanto-movado, kaj esperis, ke la 8a Azia Esperanto-Kongreso en 2015 okazos en ĉi tiu regiono de Ĉinio.

Ĉinaj esperantaj instruistoj kaj alilandaj gastoj traktis la ĉeftemon, interŝanĝis siajn spertojn en Esperanto-instruado kaj prezentis siajn atingojn en tiu sfero. Gong Xiaofeng, estro de la ILEI-sekcio en Ĉinio, prezentis la instruon metodon de Dennis Keefe por praktiki parolan Esperanton per bildoj.

En la fervojista kunsido, Han Zuwu, prezidanto de Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio, konigis al la ĉeestantoj sian vojaĝon al Bulgario por partopreni la 63-an Esperanto-kongreson de Internacia Fervojista Federacio. En diskuto pri ĝemelaj urboj, Wu Guojiang, vicprezidanto de Liaoning-a Esperanto-Asocio, prezentis la historion de la projekto de Ĝemelaj Urboj kaj elmetis siajn tri *P-ideojn*, nome Propono, Partopreno kaj Praktikado, tio signifas ke por disvastigi la movadon de starigo de rilatoj inter ĝemelaj urboj, la projekto bezonas proponojn kaj partoprenon de esperantistoj, nur post ilia partoprenado kaj praktiko la afero povas disvastiĝi rapide.

Teruhiro Sasaki faris prelegon pri traduko de klasikaj literaturaĵoj en Esperanto. Studentoj de Song Ping el Heilongjiang-a Scienc-teknologia Instituto rakontis pri sia lernado de Esperanto, kaj Ye Nianxian prelegis pri la historio de Esperanto al esperantaj komencantoj.

Lastatempe en ĉi tiu regiono de Ĉinio oni malfermis Esperanto-kursojn en Liaoning-universitato, Scienc-teknika Universitato en Heilongjiang, Liaodong-universitato kaj en kelkaj aliaj universitatoj. Danke al tio kelkcent lernantoj esperantistiĝis, tamen evidentiĝis la problemo: kiel daŭrigi la lernadon kaj kiel restigi la lernintojn en Esperantujo? Ĉu la instruado sufiĉas? Eble la ŝlosilo kuŝas en la temo de ĉi tiu kongreso — instruado kaj aplikado. Nur aplikado de nia lingvo estas efika metodo disvastigi ĝin kaj fari ĝin viva kaj esprimriĉa.

Chen Ji, Jin Chenxi

Ĉinio: 70 diplomoj en Foshan

26 jun okazis la ferma ceremonio de la kurso de Esperanto en la lernejo pri profesiaj studoj en la ĉina urbo Foshan. Post brila prezentado de la profesoroj kaj lernantoj okazis la disdonado de diplomoj al ĉ. 70 gelernantoj kiuj sukcese finis la kurson de Esperanto.

Ankaŭ okazis kortuŝa ceremonio omaĝe al la instruisto, la hispana esperantisto Augusto Casquero, kun enmanigo al li de bela honora diplomo, ĉar li post la fino de la kurso revenos al Hispanio, sen certeco ke li denove instruos en Ĉinio. Probable alia hispana esperantisto, konata instruisto de Esperanto, Rafael Mateos, anstataŭos lin.

Fine de la aranĝo ĉiuj kunmanĝis kaj trinkis en belega amikeca etoso.

Augusto Casquero

Zaozhuang: Internacia Festivalo

La 4an Zaozhuang-an Internacian Festivalon de Esperanto kun kvindekda esperantistoj el Ĉinio kaj Japanio, okazigita 10–12 sep 2010 en Zaozhuang-a Universitato kaj Zaozhuang-a Profesia Instituto, kunaranĝis Zaozhuang-a Esperanto-Asocio, Zaozhuang-a Amikeco-Asocio kun Fremdaj Landoj kaj Zaozhuang-a Federacio de Sociaj Rondoĵoj.

Egawa Harukuni el Japanio prelegis por gestudentoj en turisma fakultato de Zaozhuang-a Profesia Instituto, kaj partoprenantoj prezentis kantojn kaj naciajn dancojn en Esperanto. Ili ankaŭ vizitis Zamenhof-buston en la kultura placo de la urbo Zaozhuang kaj prezentis bukedojn al nia majstro.

En la festivalo oni funkciigis ekspozicion de la 3a Internacia Fotokonkurso de esperantistoj, en kiu partoprenis pli ol 60 fotoj de 18 esperantistoj el ses landoj.

La gvidantoj de la du gastigintaj altlernejoj donis sian subtenon al la Festivalo.

Profesoro Hu Xiaolin, rektoro de Zaozhuang-a Universitato, kiu intencas funkciigi Esperanto-lecionojn partoprenis en la bankedo. Profesoro Wang Honglin, vicrektoro de Zaozhuang-a Profesia Instituto, kiu intencas disponigi ĉambrojn al la starigata Esperanto-Muzeo, partoprenis la tutan programon de la festivalo. Ili multe scias pri la idealo kaj utileco de nia lingvo Esperanto kaj interesiĝas pri nia movado.

Semio

Esperanto ĝuas subtenon en Zaozhuang, urbo kun 3,6 mln loĝantoj en la provinco Shandong.



FESTO: sub la suno kaj la luno

Festo! Festo!! FESTO!!! Tiuj ĉi vortoj estis la plej popularaj dum la neforgebla semajno de la 13a ĝis la 20a de aŭgusto en Donneville ĉe Tuluzo (Francio), sur kampo ĉe la studio *Vinilkosmo* — verŝajne la plej mojosa loko en Francio. La organiza teamo kaj la mastro de la studio, Flo, aranĝis vastan kaj komfortan festejon por ke la ducento da partoprenantoj libere festu dum la aranĝo.

La freneza etoso dum la koncertoj aperis danke al JoMo, Kim Henriksen, *Martin kaj la Talpoj*, loka bando *Dancers in Red*. *Kaj Tiel Plu* dancigis la publikon per mezepokaj dancoj, Gijom alportis belan muzikon pri profundaj sentoj. La franca repisto Whity kaj Platano (Pafklik) montris, kiel oni povas balanci la mondon nur per forto de vortoj kaj ritmo.

Eĉ ekskursoj dum FESTO estis viglaj. Ekzemple, Tuluzon montris JoMo mem! La ekskurso ne estis limigita nur per vizito de famaj preĝejoj kaj domoj kaj per promenado laŭ la antikvaj stratoj miksitaj kun historioj kaj legendoj de la urbo. Dum vizito de la Okcitanana domo en Tuluzo slamisto Lou Dâvi anstataŭis tutan bandon, kaj liaj kantoj en la okcitanana helpis ĝui la etoson de Tuluzo.

La ekskursoj vere abundis dum FESTO: oni povis viziti Albi kaj Cordes-sur-Ciel, Spacurbon de Tuluzo, diversajn muzeojn (ekzemple, sonorilmuzeon kaj muzeon de Toulouse Lautrec), bicikli kaj eĉ viziti Andoron. Por tiuj, kiuj prifajfis ekskursojn estis atentindaj diversaj prelegoj kaj kursoj (interalie, dum la aranĝo oni povis lerni iom la okcitanan). De vesperaj koncertoj publiko flue translokiĝis al parolema trinkejo, pensema gufujo aŭ dancema diskejo. Ĉiu povis amuziĝi laŭ sia gusto!

FESTO estis malferma ankaŭ por ekstera publiko, koncerto en Tuluzo de *Kajto* kaj alveno de interesiĝantoj en Donneville montris atmosferon de festo en internacia kompanio kaj certe logis multajn personojn al Esperanto.

Por daŭrigi la plej frenezan kaj mojosan aranĝon de la somero oni povis partopreni MoZoFoKon en Liona okupejo, kiu donis fortan senton de vera libereco. Babilado, promenoj en la urbo, naĝado, familiecaj vespermanĝoj kaj noktaj eliroj por trovi ion aŭ ĝui la kompanion.

Post tiaj aranĝoj oni vere povas diri ke Esperantujo vivas. FESTO! FESTO!! FESTO!!!

Aleksej Korĵenkov



FESTO: Martin Wiese kaj Lasse Falck en la koncerto de *Martin & la Talpoj* (Fotis Ivo Miesen)

EsperantoLand en Strasburgo

Esperanto-parolantoj el ok landoj partoprenis en la unua “Internacia Kongreso” de EsperantoLand, kiu okazis 6–13 aŭg en Strasburgo (Francio).

La prelegoj traktis temojn rilate al Esperanto kiel “Kondiĉoj de tutmondeco por Esperanto” (Johan Derks), “Kiel faciligi Esperanton?” (Josef Dörr) kaj “Gerila surmerkato” (Lu Wunsch-Rolshoven). Krome prezentiĝis prelegoj pri lingvolernado kaj organizado de entreprenaj procesoj: “Problemoj de instigo en la akirado de dua lingvo” (Robb Kvasnak) kaj “La teorio de limigoj laŭ Goldratt” (Cyrille Hurstel). Nicky Janssen prelegis pri “Rakontado tra la tempoj kaj la mondo” kaj prezentis rakontojn el Hindio kaj el Japanio (kune kun Lode Van de Velde). Rainer Kurz montris lumbildojn el Suda Afriko. Lode Van de Velde cerbumigis la partoprenantojn per kvizo pri la lingvoj de la mondo kaj kun Nicky Janssen preparis varian programon por la adiaŭa vespero.

La turisma programo gvidis la partoprenantojn al la bela malnova urbocentro de Strasburgo kaj al la najbara Kehl; krome okazis vizito de regiona radiostacio. Oni ĝuis noktan lumigon de la katedralo kun muziko, boatan rondveturadon tra la urbo kaj, kompreneble, la gastronomiajn ofertojn de Strasburgo. Pliaj ekskursoj iris al florfestoj en Sélestat kaj al la kastelo de Haut-Koenigsbourg.

La dua “Internacia Kongreso” de EsperantoLand estas planata post unu jaro, verŝajne en Belgio aŭ Nederlando.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

Proksimiĝi al niaj verkistoj

19 jun okazis en la eta nordkroata vilaĝo Hrašćina, en kiu Spomenka Štimec havas sian domon, tradicia renkontiĝo de Esperanto-verkistoj, organizita de Kroata Esperanto-Ligo.

La ĉefaj gastoj estis Anna Löwenstein el Italio kaj Imre Szabó el Hungario. La literaturan kreadon de Anna prezentis Zdravko Seleš kaj tiun de Imre — Kruno Puškar. El la verkoj de ambaŭ verkistoj legis fragmentojn Saša Pilipović, aktoro el Serbio.

Post la paŭzo kun abundaj kukoj kaj kafo amuzis nin Saša Pilipović per prezento de fragmento el teatraĵo *Dek tagoj de Postnikov* kaj kantado kun gitarakompano. Li disponigis al ni ankaŭ novan DVD sur kiu estas filmita la tuta teatraĵo de Ŝelter-teatro el Kragujevac. La film-aĵo estas altprofesia produkto daŭranta iom malpli ol unu horon kaj mi taksas ĝin la plej altkvalita filmo en Esperanto, ne nur pro profesia reĝisorado kaj scenografio, sed ĉefe pro bonega profesia aktorado. Nepre aĉetinda disko por ĉiu esperantisto. Fine prezentis Zdravka Metz sian novan libron.

La renkontiĝo ebligis al ŝatantoj de Esperanto-literaturo refoje pliproksimiĝi al la verkistoj mem, ekscii de ili pri ilia vivo kaj maniero verki kaj ekkoni unuflanke la admirindan prozon de Anna en ŝiaj du dikegaj romanoj kaj la nesufiĉe konatan sed valoran poezion de Imre.

Ĝi estis ankaŭ okazo por babiloj kaj personaj renkontoj de esperantistoj venintaj ĉi-foje el sep landoj.

Zlatko Tišljarić

Unufraze

★ Reprezentantoj de UEA Penelope Vos k Dianne Lukes prezentis proponon de UEA al la 63a NRO-konferenco de UN, kiu okazis 30 aŭg – 1 sep en Melburno. (Stefano Keller)

★ Socialisma partio de Irlando “ĉirigi” subtenas Eon k uzas la verdan stelon kiel sian simbolon. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 17 sep fine de la programo *Connecting the World* (Konektante la Mondon) la populara televida kanalo CNN Internacia dissendis programeron pri lingvoj, en kiu programgvidanto k Ariko Okrent prezentis ankaŭ Eon. (Stefan MacGill)

★ La nova Leĝo pri Ĝenerala Instruado ebligas instrui Eon en ĉiliaj lernejoj k gimnazioj. (*Heroldo de Esperanto*)

★ Ligo al la E-versio de la informilo pri la Monda Socia Forumo (Dakaro, 2011), tradukita en Eon de estraranoj de la Meksika E-Federacio, aperis en la ĉefpaĝo de MSF. (Landa Agado)

★ 29 aŭg en Kopenhago kadre de la tradicia Internacia Tago funkciis E-budo. (*Esperanto en Danio*)

★ Grupo da e-istoj ĉeestis inter tri mil partoprenantoj de la 3a (neespa-ista) festivalo “Esperanto-Kulturifesto”, kiu okazis en la alpa urbeto Ehrwald, Aŭstrio. (*Esperanto aktuell*)

★ Pli ol 250.000-foje estis spektita en Youtube iu el 6 ĉapitroj de la filmo *Esperanto estas...*, kreita de E@I k trovebla ĉe: <http://www.youtube.com/esperanto-estas>. (EEU)

★ La estraro de Ateista Tutmonda E-Organizo (ATEO) decidis aliĝi al la Internacio de Liberpensuloj, kies fonda kunveno okazos en 2011 en Oslo. (*Heroldo de Esperanto*)

★ La lastan junian semajnfino kunvenis 14 politike interesataj e-istoj el kvin landoj en Alsóörs (Hungario) por diskuti la politikan programon de EDE-federacio. (*Esperanto aktuell*)

★ La poemaro *Kajto* (Moskvo, 2008) de la ruslingva hebreo Mikaelo Bronŝtejn gajnis la premion “La Verko de la Jaro”, asignitan de la abonantaro de *Literatura Foiro* pri la originala poezio de la lasta jardu. (HeKo)

★ Mauro Nervi, E-poeto k prezidanto de la Akademio Literatura de Eo, estos 27 nov 2010 la ĉefpreleganto de la 33a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. (GK UEA)

★ Laŭ decido de la estraro de TEJO ekde oktobro la 28-jara italino Manuela Ronco deĵoros en Roterdamo kiel volontulo de TEJO. (TEJO)



Aŭtunaj Tagoj de EAF en Estonio

Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) ne unufoje transnavigis golfon, sed antaŭe ni krozis nur trans la Botnia Golfo por kunaranĝoj kun niaj svedaj samideanoj. Nun estis vico de la Finna Golfo kaj niaj estonaj amikoj. La tradiciaj Aŭtunaj Tagoj de EAF okazis en Tallinn kaj Tartu 10–12 sep 2010.

Al Estonio venis pli ol kvindek gesperantistoj Finlandaj, ne nur finnaj, kiuj estis amike akceptitaj vendrede en Tallinn, kie en la bela salono de Instruista Domo ni kunfestis gajan vesperon. Sabate tagmeze ni per mendita buso atingis la urbon Tartu. La vera centro de Tartu estas la universitato, kiun ni vizitis kaj admiris. Gaja vespero pasis en la gastejo *Starest*, kun vespermanĝo, kantoj kaj aliaj elpaŝoj.

Reveno de Tartu por ŝipreveno al Helsinki estis aparte interesa ekskurso kun trihora halto en mezvoja urbeto Paide, kie estis proklamita la sendependeco de Estonio en februaro 1918.

Dankon al Edda-Merike Pelt kaj al aliaj organizantoj.

Tuomo Grundström

IJL sukcesa kaj daŭrigota

La unua Internacia Junulara Lingvotendaro (IJL) okazis 11–18 jul en Jászberény, Hungario.

En mateno de lundo je la 6a horo kaj 30 minutoj je ĉies surprizo eksonis la konata kanto *Gumaj ursetoj*, kiu preskaŭ fariĝis “himno de la tendaro” — kun regula fajfado. La fajfilo estis en buŝo de Johano Nagy, kiu tiamaniere invitis ĉiujn por gimnastiki. Unufoje li ne rikoltis grandan sukceson, sed ekde

Madis Linnamägi akceptas la finlandajn gastojn en Tartu. Malantaŭe staras Tiina Oittinen. (*Fotis Sakari Kauppinen*)

mardo la matena gimnastiko iĝis neprogramero de la tagkomenco.

Post la bongusta kaj abunda matenmanĝo ekis la instruado, praktikado de Esperanto en du niveloj. Teresa Kapista el Serbio gvidis la lernemulojn, kiuj komencis penetri en misterojn de la internacia lingvo.

Bedaŭrinde, Stanisław Mandrak el Pollando ne povis veni, kaj nia prezidanto Imre Szabó anstataŭis lin. Li kolektis la scisuĉemulojn ĉirkaŭ si, kaj poluris la lingvoscion de la progresantoj en ekstera konversaciejo.

La antaŭtagmezoj daŭris simile dum la tuta semajno. Dum la posttagmezoj ni ekskursis ofte. Ni vizitis la best- kaj botanik-ĝardenon, la urbon Jászberény, la muzeon Jász. La troa varmo instigis nin plonĝi en la malvarmetan akvon de eksterurba strando. Ĉiuvespere la interesaj interparoladoj, karaokeoj, rostado de lardo metis la kronon sur la tagon.

Vendrede vespere la tempo reiris al la 1970-aj jaroj. Rok-bando muzikis, laŭepoke vestitaj dancistoj dancis. La etoso obsedis ĉiujn, ne ekzistis piedoj, kiuj povus resti surloke.

La 2a IJL okazos 3–10 jul 2011 en Jászberény, Hungario. Legu pli rete: <http://eszperanto.t-online.hu>

Ferenc Harnyos

GeIERT-2010

10–17 jul 2010 en Gelenĝik-Betta (suda Ruslando) okazis la tradicia GeIERT (Gelenĝika Esperantista Renkontiĝo Turista), kun 37 ruslandaj esperantistoj el 12 urboj.

Dum ok tagoj oni ĝuis ripozon ĉe la Nigra maro, partoprenis kelkajn ekskursojn: al dolmenoj, delfinejo, tra Gelenĝik. Okazis ankaŭ montara rigardado sur ĉevaloj. Ĉiutage estis lecionoj por komencantoj kaj perfektigantoj. Ĉiuvespere estis kantado, muzikado kaj dancado. Marina Kocarj el Krasnodar helpis al komencantoj kaj vespere kantis, ludante gitaron kaj fluton, kaj instruante Esperanto-kantojn al partoprenantoj.

La vilaĝo Betta situas ĉe pitoreska mara golfeto, ĉirkaŭata de montoj kaj arbaroj. La uzita ripozejo havas komfortajn kaj nemultekostajn lignodometojn, tie okazos, eventuale, sekvaj GeIERToj, aŭ eĉ pli grandaj tendaroj.

Anatolo Ivassenko

Hispanio plu perdas tempon

Dafydd ab Iago el Bruselo


Komence de septembro la milita movado ETA (Euskadi Ta Askatasuna = Eŭskio kaj Libereco) anoncis, ke ĝi ne plu “atakos”. Laŭ ETA tio estas anonco de batalhalto. Fakte, ETA ne plu “atakis” ekde la somero de 2009, kvankam intertempe franca politikisto mortis per “defendaj” pafiloj de ETA-anoj.

Ne daŭris longe, antaŭ ol hispaniaj politikistoj kritikis la anoncon kiel nesufiĉan. “ETA haltas pro tio, ke ĝi ne plu povas daŭrigi”, — diris Alfredo Pérez Rubalcaba, la hispania ministro respondeca pri internaj aferoj. Laŭ li, la anonco de ETA estas tute sensignifa kaj ne meritas multan atenton. “Ili faras tion post la detruo de logistika bazo en Portugalio kaj post provo fari ion novan en Girona”, — daŭrigis Rubalcaba.

Pluraj membroj de la Eŭropa Parlamento ne konsentas kun Rubalcaba. Laŭ ili, Hispanio perdas ŝancon starigi pacon en Eŭskio. “En Norda Irlando, la Eŭropa Unio faris kontribuon signifan por estigi kaj fortigi la pacan proceson, kiu estis stariĝinta en 1998, — diris François Alfonsi, membro de la Eŭropa Parlamento el Korsiko. — Ankaŭ en Eŭskio necesas ke EU plenumu siajn respondecojn”.

Alfonsi ricevis apogon de alia membro de la Eŭropa Parlamento, Oriol Junqueras el Katalunio. Laŭ Junqueras, la anonco de ETA estas baza paŝo al paco. “Nun estas tempo por la registaro kaj partioj en Hispanio adopti malavaran sintenon por faciligi al ETA unuflankan, senkondiĉan kaj finofaran anoncon pri halto de perforto”, — aldonis Junqueras. Laŭ ĉi tiu kataluna politikisto nepras, ke la hispania registaro kunlaboru kun ĉiuj sektoroj de la socio en Eŭskio.

Eĉ laŭ la konservativa ĵurnalo *Financial Times* (Londono), valoras la penon diskuti pri paco kun ETA. Ĉi tiu financa tag-



Post la lasta batalhalto (2006), ETA mortigis du personojn ĉe la flughaveno de Madrido. (Foto el Wikimedia Commons)

ĵurnalo, en redaktora artikolo, sugestas ke Hispanio denove faru “laŭleĝa” la partion *Batasuna*, konsiderata de la registaro en Madrido kiel la politika brako de ETA. Nepras ankaŭ revenigi al Eŭskio la malliberigitajn ETA-anojn el prizonoj en aliaj partoj de Hispanio. Tiel iliaj familianoj povus ilin viziti en Eŭskio sen esti devigita vojaĝi foje milon da kilometroj.

Laŭ la hispania ministro Rubalcaba, estas neniu simileco inter la paco en Norda Irlando kaj la nuna situacio en Eŭskio. Malbonŝance, la sinteno de Rubalcaba kaj de la hispania registaro montras, ke ili pravas. En la kazo de Norda Irlando, iom post iom akceptiĝis en Londono ke la popolo tie mem havas la rajton decidi pri sia futuro. En Madrido oni plu koleriĝas pri la ebleco — kaj ne rajto — de popoloj en regionoj kiel Katalunio kaj Eŭskio decidi, ĉu ili volas aŭ ne resti en Hispanio.

Pri la redaktado de la revuo *Esperanto*

La nova estraro de UEA, elektita en Havano, esprimas bedaŭron pro la disvolviĝo de publika diskuto pri la redakto-politiko de la revuo *Esperanto*, kaŭzita ĉu de miskompreno ĉu de opiniesprimoj formulitaj surbaze de nepreciza kono de faktoj.

La estraro tamen konsideris ankaŭ la publikan diskuton kaj sekvas jenan planon rilate tiun demandon.

La estraro akceptas la opinion de la Komitato de UEA el la kunsido la 27an de julio, kiu estis vortumita jene: “La Komitato petas la estraron okupiĝi pri nova redakto-politiko de la eldonaĵoj de UEA, inkluzive de la revuo *Esperanto* kaj prezenti la proponon pri la nova redakta politiko al la Komitato mem antaŭ ol akcepti ĝin. Intertempe oni ne faru aliajn decidojn pri tio. La komitato petas tion konsiderante la ĝisnunajn decidojn de la estraro”.

La estraro, elektita en Havano, malvalidigis la decidon de la malnova estraro pri la redakto-politiko, t.s. ne ĉesigas la kontrakton kun la redaktoro de la Revuo kaj ne anoncas varbadon por la redaktora posteno. Post la denova konsidero de la afero, la estraro informas, ke:

1. Ĝi formulos novan redakto-politikon konsiderante, ke la teksto-redakta kaj la grafika-engaĝiga laboroj por la revuo estas diversfakaj taskoj, ne nepre farendaj de la sama persono; la nova redakto-politiko estos subigita al la konsulto de la Komitato.

2. La kontrakto kun la ĝisnuna redaktoro (laŭ la ĝisnuna vortumo) plu validos ĝis la livero de la julia-aŭgusta numero de 2011 inkluzive.

3. Surbaze de la nova redakto-politiko, la estraro difinas skemon por la redaktado de la revuo *Esperanto*, diskonigotan komence de 2011. Tiam ĝi proponos al la nuna redaktoro daŭrigi sian laboron en la redaktado de la Revuo laŭ tiu nova skemo kaj kadre de nova, reviziita kontrakto.

4. Se la nuna redaktoro malakceptos aŭ/kaj se estos necesaj aldonaj kunlaborantoj, la estraro anoncos inviton al kandidatoj por tiuj kromaj redaktaj laboroj.

5. La retejo de UEA estos uzata ne nur por liveri elektronikan kopion de la papera revuo, sed ankaŭ por disponigi foruman retpaĝaron por uzo fare de la membroj de la Asocio. La moderigado de tiu forumo estos la tasko de nomumotaj respondeculoj.

Barbara Pietrzak
Ĝenerala Sekretario de UEA

RADIO	Radio Esperanto <i>Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado</i>
ESPERANTO	Novaĵoj / Komentarioj / Muziko Aŭskultu: http://la-ondo.rpod.ru

Konsula deklaro pri la nomadaj popoloj

(HeKo) La nomadaj popoloj, ciganaj (sinthoj, kaleoj, roŭmoj) kaj ne ciganaj (ekzemple jeniŝoj), vivantaj sur la eŭropa kontinento jam de jarcentoj, estas eŭropaj popoloj. Tial, kiu malamas la ciganojn, tiu ne estas aŭtenta eŭropano.

Se ĉiu civitano de Eŭropa Unio rajtas libere moviĝi sur la teritorioj de la membroŝtatoj, al neniu nomado kiu estas EU-civitano eblas apliki alian restriktan normon ol tiun rezervitan al ajna vagabondo, senhejmulo, trampo fare de la leĝoj de la koncerna ŝtato. Tio inkluzivas ankaŭ la normojn koncerne la nelegitiman okupadon de tereno.

La fakto, ke diasporo ne esprimas subjekton de internacia juro, kaŭzas ke ĝi estas pli facile marĝenigebla. La socia marĝenigo estas des pli rapida, se la diaspora popolo estas malriĉa aŭ/kaj se ili estas nomadoj. La fiasko de Ciganiao, lanĉita en 2000, plej negative influas al la nuna bedaŭrinda konjunkturo, unuavice en Francio.

Ni opinias ke Eŭropa Unio devas urĝe interveni, por garanti sekurecon al la diasporaj popoloj, atingeblan nur per pozitivaj mekanismoj de socia integriĝo. En tio ludas esencan rolon la respekto por la kulturaj kaj lingvaj rajtoj de la koncernaj minoritatoj, konforme al la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj (1996).

La esperantlingva popolo, diaspora kaj minoritata en Eŭropo same kiel aliloke, estas inter la spirite plej preparitaj por kompreni ĉi tiun problemaron, ankaŭ pro la strebo mem esprimi subjekton de internacia juro, pere de la Esperanta Civito.

Giorgio Silfer, Konsulo de la Esperanta Civito

Unuafoje en la kafejo Esperanto

La tradicia somerfina kunveno de la Tel-Avivaj esperantistoj okazis la 31an de aŭgusto. Partoprenis esperantistoj de la tuta lando — de Haifo en la nordo ĝis Beer Sheba en la sudo, kaj estis rekorda nombro de preskaŭ kvardek partoprenoj. Oni multe babilis, bonguste manĝis kaj spektis bildojn pri Kubo.

Post la kunveno okazis vizito al la nova Tel-Aviva kafejo *Esperanto* en la strato Zamenhof (vidu la foton en la 27a paĝo de la antaŭa *Ondo*). Estis tre agrable — kaj klimato kaj etose. Grupeto da esperantistoj restis tie pluajn du horojn. La juna kaj entuziasma posedanto estas tre simpatia kaj kunlaborema. Granda portreto de Zamenhof aperas sur la muro, kaj malgranda sur la menuo (vidu la foton). Oni proponis esperantigi la menuon kaj fojfoje kunveni en la kafejo post la klubo.

Amri Wandel



La elpelata nacio

“La esperanta nacio” — jen titolo bone trovita por logi legemon! Tamen la paralelo inter romaoj/ciganoj kaj esperantistoj ne aparte trafas, malgraŭ ke Esperantaj aŭtoroj foje komparas diversajn diasporojn almenaŭ ekde fama artikolo de Dario Besseghini en *Kontakto* (1981). Sed, dum preskaŭ neniu elektas esti romao, preskaŭ ĉiu esperantiano iam elektis sian apartenon.

Mi dubas ankaŭ ĉu romaoj vere “enkorpigas la Eŭropan filozofion”. Ĉu vojaĝemo kaj lingvokapabloj konsistigas filozofion?

Estas simplige diri ke “dudek jarojn post la fino de la komunismaj registaroj... romaoj daŭre ne integriĝas kun la lokaj popoloj”. Unue, ankaŭ romaoj estas “loka popolo”, vivantaj en la koncerna lando ofte same aŭ pli longe ol aliaj loĝantoj; due, sian integriĝon malfaras ne ili mem, sed la senkompataj ŝanĝoj ekonomiaj, pro kiuj ekde 1990 ili perdis ĉian ŝancon en la labormerkato. Hungario, kies kazon mi iom konas, senfare atestadas kiel ĝiaj romaj civitanoj sinkadas plu en mizeron. “Hungaraj ciganoj bezonas amikojn”, — diris al mi en 1996 Kees Bakker, nederlanda aktivulo helpanta romaojn de konkreta hungara regiono, kiu trafis nenian kunlaboremon de landaj aŭ lokaj aŭtoritatoj.

Nun, kiel EU-civitanoj, romaoj rajtas libere serĉi pli bonajn vivkondiĉojn en ajna EU-lando. Se ili restas pli ol tri monatojn, ili devas havi laborkontrakton aŭ pruvon pri kapablo vivteni sin. Kiam Francio kaj Italio elpelas romaojn, ili agas hipokrite, ĉar samtempe iliaj leĝoj praktike malebligas la ekeston de tiaj laborkontraktoj.

Koncerne Francion, multaj opinias ke, instigante forpelo-kampanjon, prezidento Sarkozy celis precipe forpeli la atenton pri diversaj skandalaj preskaŭ atingantaj lin persone, plus pri la necesa, kaj manifestaci-provoka, reformado de la franca pensia sistemo.

Tion ke “Sarkozy instigis al la detruado de ĉ. 500 neleĝaj romaj tendaroj”, Francio oficiale dementis; sed, dum mi verkas ĉi tiujn frazojn, la gazeto *Le Monde* malvualas oficialan cirkuleron, per kiu la ministerio pri interno instrukiis malmunti 300 neleĝajn kampadejojn “prioritate de romaoj” kaj bedaŭris ke tiajn malmuntojn ne sekvis sufiĉaj ellandigoj.

Por deliktuloj devas validi la leĝoj de la respubliko — sed individue. Persekuti grupojn pro ilia etna aparteno elvokas la plej nigrajn ombrojn de la eŭropa historio.

István Ertl

Larmoj fluadas

Mi planas mondan ekspozicion pri pupoj. Atilio Orellana Rojas, laboranta ĉe *Swany*, ege helpis kolekti pupojn per Esperanto. Kiam li serĉis afrikajn pupojn, li prezentis al mi la prizorganton de la orfejo Nabouba en Benino, Vladka Chvátlová. De 2009 ŝi flegas tie 80 infanojn (2–15-jaraj), kiuj loĝas en du domoj sub la kontrolo de direktoro. Ŝi vizitas ilin ĉiujare dum monato por kontroli, instrui Esperanton kaj diskuti pri la estonteco. Plurfoje pro malbonaj vivkondiĉoj ŝi preskaŭ malsane revenas al Bruselo kie ŝi loĝas kaj laboras. Vladka estas ideale nobla persono por la mondo.

Aŭdinte pri ŝia agado, mi daŭre eklarmis, ĉar min ege korduŝis kaj mi memoras, ke en la mondo 8.8 milionoj da infanoj mortas antaŭ la 5-jariĝo ĉiujare. Malsana globo la mondo estas.

Etsuo Miyoshi

KOMPUTILE

Sociaj retejoj kaj retaj komunumoj

Interreto ebligas nuligi la geografiajn distancojn kaj tial estas tre efika ilo por internacia komunikado kaj tenado de kontaktoj. En la komenco oni interkomunikiĝis kun unuopuloj, sed lastatempe pli kaj pli populariĝas komunumaj retejoj. Tie oni starigas sian profilon, eltrovas inter la aliaj uzantoj siajn jamajn aŭ novajn amikojn, kaj poste kundividas novaĵojn, pensojn, fotojn, videojn aŭ interesajn ligilojn kun ili. Kaj ĉar Esperanto helpas nuligi la lingvajn barojn, ne estas mirinde ke esperantistoj aparte profitas tiujn servojn.

Facebook (*Vizaĝlibro* aŭ *Vizaĝaro*) <facebook.com> estas la plej populara socia retejo en la mondo. Fondita de la usona studento Mark Zuckerberg en 2004, ĝi nun havas 500 milionojn da aktivaj uzantoj. En kelkaj landoj ĝi jam fariĝis pli populara ol la serĉilo Google. La uzantogrupo "Esperanto" tie havas pli ol 8.000 membrojn kaj pluraj Esperanto-organizoj (inkluzive de E@I) informas pri sia agado tie. La interfaceto estas plejparte tradukita en Esperanton, kvankam foje ankoraŭ restas eraroj.



ipernity (*interreta eterneco*) <ipernity.com> aparte populariĝis inter esperantistoj pro la pli internacie ekvilibra membraro (anglalingvanoj ne superregas) kaj pro la dekomenca preteco de la kreintoj kunlabori pri Esperanto-interfaceto. La retejo speciale taŭgas por kundivido de bildoj, filmoj kaj sonregistraĵoj, sed aldonas ankaŭ funkcion de blogoj. Partoprenas pli ol 1.000 Esperantistoj, la ĉina traduko de la retejo efektiviĝis pere de Esperanto.

orkut (*orkuto*) <orkut.com> kreita de Orkut Büyükkökten, programisto de Google, estas hodiaŭ superregata de brazilanoj, sed pro tio ankaŭ Esperantistoj multas: la grupo "Esperanto Brasil" tie havas pli ol 5.000 membrojn. Ĝi estis la unua socia retejo kiu disponis je Esperanta interfaceto.

Amikumu <amikumu.com> estis la unua interkona retejo speciale por esperantistoj, lanĉita de teamo ĉirkaŭ Chuck Smith en 2007. La kreintoj celis atenti la fakton, ke uzantoj kutime parolas pli ol unu lingvon, kaj ankaŭ doni al ili eblecon serĉi aliulojn laŭ geografia proksimeco aŭ Esperanto-aranĝo kiun ili partoprenis. Estis pli ol 1.800 uzantoj, antaŭ la retejo en julio de 2008 senkomente malaperis.

Esperanto.com <esperanto.com> iusence anstataŭigas la antaŭan. La retejo celas nur esperantistojn kaj, kvankam ĝi estas ankoraŭ nefinfarita, ĝi jam havas pli ol 1.300 uzantojn.



LiveJournal (*Vivjurnalo*) <livejournal.com> unuavice servas verkadon kaj legadon de taglibroj kaj estis populara inter esperantistoj ĉirkaŭ la jaro 2006, kiam kadre de la Internacia Seminario en Germanio apartan kunvenon faris 14 ĉeestantoj aktivaj en ĝi. Nuntempe la retejo orientiĝas precipe al ruslingvanoj.

studivZ (elparolu: ŝtudi-faŭ-cet) <studivz.net> estas sukcesa retejo origine por germanlingvaj studentoj, interesa pro la fakto, ke ĝia kunkreinto estas juna esperantisto Dennis Bemann. En 2007 la kreintoj vendis la retejon kontraŭ nemalkaŝita sumo, oni spekulacias pri milionoj da eŭroj.

Kelkaj retaj komunumoj aparte famas en certa lando. Ekzemple, en Ruslando **Vkontakte** <vk.com>, kie la grupo "Эсперанто" havas pli ol 10.000 membrojn. Aliaj specialiĝas pri certa temo, ekzemple, pri instruado de lingvoj: ĉe **lernu!** <lernu.net> de E@I lernas Esperanton pli ol 90.000 uzantoj; kursoj de Esperanto laste aperis ankaŭ en la lingvolerna komunumo **Livemocha** <livemocha.com>. Serĉi amon per Esperanto eblas ĉe **Edzperanto** <edzperanto.org>.

La plej malnova reta Esperanto-komunumo estas la novaĵ-grupo **soc.culture.esperanto** <groups.google.com/group/soc.culture.esperanto>. Funkcia ĝis nun jam ekde 1989, ĝia arĥivo ampleksas jam pli ol 75.000 mesaĝojn.

Marek Blahuš

KAEST 2010

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko
invitas vin: partopreni, prelegi, aŭskulti, spekti, diskuti, lerni, ekskursi, vingustumi, amuziĝi

Modra (Slovakio), 18–21 nov 2010

Pliaj informoj: www.ikso.net/kaest



Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (16)

de Halina Gorecka

Aŭgusto 1914

La milita doktrino de Germanio konsideris sinsekvan militon kontraŭ Francio kaj Ruslando. Oni antaŭvidis fulmrapidan neniigon de unu malamiko kun posta ĵeto de ĉiuj fortoj kontraŭ la dua. Al la Orienta Prusio oni rezervis nur defendan rolon.

Komence de la 20a jc. kreiĝis defendosistemo el du linioj. La unuan defendan linion formis regiono de la Mazuriaj lagoj kun la fortikaĵo Boyen. En 1901 trapasejoj inter la lagoj estis fermitaj per provizoraj fortikaĵoj. La dua defendolinio pasis laŭ la maldekstra bordo de Vistulo. Kenigsbergo rolis kiel la ĉefa fortikaĵo por atakaj kaj por defendaj agoj de la germana armeo.

Decidinte unue ataki Francion, la germana komandantaro planis, ke la trupoj en la Orienta Prusio katenu la eventualan aktivadon de la ruslanda armeo. Germanoj supozis, ke la mobilizado en Ruslando longe daŭros kaj lasis oriente malmultajn soldatojn (21%), por poste, konkerinte Francion per sia ĉefa forto (79%), militi nur kontraŭ Ruslando.

Komence de la milito la 8a armeo de generalo Maximilian von Prittwitz havis en la Orienta Prusio 173 mil soldatojn kaj ĉ. mil kanonojn. Ilin oponis du armeoj de Ruslando: la 1a armeo de generalo Paul von Rennenkampf (en Litovio) kaj la 2a armeo de generalo Aleksandr Samsonov (en la norda Pollando) kun sume ĉ. 250 mil soldatoj kaj ĉ. 1200 kanonoj. La du ruslandajn armeojn kunordigis generalo Jakov Ĵilinskij kiel la komandanto de la Nord-okcidenta fronto.

Kiam germanoj invadis en Francion kaj ekminacis Parizon franca ambasadoro petis Ruslandon tuj ekagi. Nikolao II konsentis. La ofensivo komenciĝis sukcese, la 7an (20an Gregorie) de aŭgusto la 1a armeo venkis en la batalo ĉe Gumbinnen (nun Gusev en Kaliningrada regiono) kaj pluiris okcidenten. La 2a armeo iris tra Mazurio nord-okcidenten por malebligi la retreton de la 8a armeo al Berlino.

La kampanjo ŝajnis gajnita de Ruslando, sed Germanio urĝe sendis pli ol 100 mil soldatojn el Francio al la orienta fronto. Von Prittwitz estis eksigita, kaj generaloj Paul von Hindenburg kaj Erich von Ludendorff iĝis respektive komandanto kaj stabestro de la 8a armeo.



La eminentaj komandantoj Hindenburg kaj Ludendorff haltigis la ruslandan ofensivon en la Orienta Prusio.

La dua batalo ĉe Tannenberg

Dum la 1a armeo de Rennenkampf stagnis apud Kenigsbergo, Hindenburg kaj Ludendorff decidis ataki la armeon de Samsonov. La 13–17an (26–30an) de aŭgusto la 2a armeo de Samsonov, sen la eblo de rapida komunikado kun Ĵilinskij kaj Rennenkampf, estis frakasita. 56 mil soldatoj estis mortigitaj, vunditaj aŭ kaptitaj. La 17an (30an) de aŭgusto generalo Samsonov mortpafis sin. Ĉi tiu batalo estas konata en Germanio kiel la Batalo ĉe Tannenberg, memorige pri la Kruckavalira fiasko antaŭ duona jarmilo (en 1410) en la sama teritorio.

Tamen kelkaj trupoj de la 2a armeo, malgraŭ la kapitulacio, ordonita de generalo Klujev, sukcesis retreti suden kaj orienten. La germanoj ne persekutis tiujn disajn taĉmentojn; ili lasis nur 20 mil soldatojn en ĉi tiu direkto kaj movis sian jam 230-mil-personan armeon kun 1080 kanonoj kontraŭ la 1an armeon de Rennenkampf kun nur 110 mil soldatoj kaj 900 kanonoj.

La fino de la unua kampanjo

Hindenburg kaj Ludendorff, danke al la trupoj urĝe senditaj el Francio, intencis ĉirkaŭi la 1an armeon kaj neniigi ĝin. Tio sukcesus, se Rennenkampf restus ĉe Kenigsbergo, kiel estis planite. Sed li reorganizis sian armeon kaj, malgraŭ kruelaj atakoj, la armeo en batala ordo

retiriĝis orienten. Intertempe la 2a ruslanda armeo estis refortigita, kaj la 27an de aŭgusto (la 9an de septembro) ĝi subite atakis de sude la germanojn, kiuj premis la 1an armeon. La premo iĝis malpli akra, kaj la 1an (14an) de septembro, perdinte ĉ. 15 mil soldatojn, la 1a ruslanda armeo revenis al la ŝtatlimo.

La germana deveno de Rennenkampf kaj la fakto, ke li ne helpis al la ĉirkaŭita 2a armeo, donis pretekston akuzi lin pri perfido, sed li gvidis la 1an armeon dum plia jaro (li estis pafekzekutita en 1918 pro rezigno aliĝi al la Ruĝa Armeo).

La 3an (16an) de septembro la kampanjo finiĝis. La 1a ruslanda armeo okupis defendan pozicion ĉe Nemano, kaj la 2a ĉe la rivero Narew. Sud-oriente de la Mazuriaj lagoj inter la 1a kaj 2a armeoj estis formita la 10a armeo. Ĵilinskij estis eksigita, kaj lian lokon okupis generalo Nikolaj Ruzskij. La perdoj dum la kampanjo (mortigoj, vunditoj, kaptitoj) sumis je 80 mil personoj en Ruslando kaj je 60 mil personoj en Germanio.

La relativa sukceso de Germanio en la orienta fronto estis atingita koste de malfortiĝo de la okcidentaj trupoj, kaj en septembro ĉe Marno britoj kaj francoj sukcesis haltigi la germanan ofensivon. Fiaskis la plano fulme venki Francion kaj poste ekmiliti kontraŭ Ruslando. Do, Germanio devis militi sur du frontoj.

Tiun militon ĝi ne povis gajni.

Vintra operaco en Mazurio

Por kelkaj monatoj la milito malvigliĝis. Dum la paŭzo Hindenburg, kiu iĝis komandanto de la Orienta fronto, ricevis el la Okcidenta fronto kaj el Germanio aldonajn trupojn kaj armilojn. Komence de 1915 li havis jam du armeojn — la 8an kaj la 10an.

Hindenburg intencis per ilia forto venki la 10an ruslandan armeon de generalo Sievers (ankaŭ germano) ĉe Avgustov (nun Augustów en Pollando) kaj trarompi la fronton. Dum la arda bataloj en februaro 1915 la 250-milpersono germana soldataro ne sukcesis “enkaldronigi” la 155-milpersonan 10an ruslandan armeon. Tamen la fronto estis movita orienten, kaj la nord-okcidentaj ruslandaj trupoj ne plu atakis Orientan Prusion.

En la Orienta Prusio oni komencis likvidi la militajn damaĝojn. Por la damaĝitaj urboj estis difinitaj urbojpatronoj en la centro de Germanio, kiuj helpis per laborforto, konstrumaterialo kaj nutraĵo. Jam en 1916 la detruoj estis plejparte likviditaj. Post la fino de la bataloj pli ol 500 mil rifuĝintoj revenis.

Daŭrigota


Poemoj de Fjodor Tjutĉev

Fjódor Ivánoviĉ Tjutĉev (Тютчев) naskiĝis en 1803 en riĉa nobela familio proksime de Brjansk. Farinte en la hejmo la gimnazian kurson sub la gvido de Semjon Raiĉ (Amfiteatrov), li dum du jaroj kompletigis la studojn en la Moskva Universitato, kaj jam en la 18-jara aĝo ekoficis kiel diplomato en Munkeno, kie li pasigis pli ol dudek jarojn.

Reveninte en Ruslandon li ekoficis kiel cenzuristo en la ministerio pri eksteraj aferoj. En 1858 li iĝis prezidanto de la Komitato pri cenzuro de eksterlandaj eldonaĵoj, en kiu posteno li restis ĝis la morto (1873) en la alta ŝtatoficista rango “sekreta konsilisto”.

Tjutĉev tre frue ekverkis poezie. Oni konas poemon, kiun li verkis kiel sepjara infano. Kiam li estis 14-jara li estis akceptita kiel membro de la Societo de ŝatantoj de la rusa literaturo, sed post la fino de la universitato li malofte verkis, kvankam liaj tiutempaj *Printempa fulmotondro* (1828), *Printempaj akvoj* (1830) kaj *Silentium!* (1830) estas nun en la “trezorujo” de la rusa poezio. En Bavario li tradukis verkojn de Ŝilero, Goeto kaj Heine.

Lia debuta poemaro aperis nur en 1854, kaj en ĝi jam estis liaj poemoj inspiritaj de la amrilato kun la juna Jelena Denisjeva (La ciklo de Denisjeva), kies morto en 1864 kaŭzis fortan krizon ankaŭ en liaj poezio kaj publicistiko. Liaj poemoj, verkitaj en la posta vivoperiodo estis precipe meditigaj: pri la vivo, pri la aĝo, pri la naturo, kaj pri Ruslando, inkluzive de la oftege citata “Ruslando ne kompreneblas racie...” (1866).



AIKO

AI N. N.

*Vi amas! Vi afektas tre volonte:
Se en tumulto, ekster hom-atent',
Per gambo mi vin tuŝas por moment',
Respondas vi — kaj ne ruĝiĝas honte!*

*Aspekto samas — distra kaj sensenta,
Ridet', okuloj, movoj — sama bel'...
Sed via edzo, fia sentinel',
Admiras vian ĉarmon, memkontenta!..*

*Vi dank'al homoj kaj laŭ la destin'
Valoron de kaŝitaj ĝojoj multaj
Ekkonis... Estas, laŭ mondom', adultaj
La ĝojoj... Sed adulto flatas vin.*

*Kaj la hontema ruĝo senrevena
De viaj freŝaj vangoj flugis for —
Jen fuĝas la radio de Aŭror'
De junaj rozoj kun anim' serena.*

*Do estu tiel. Dum somera ard'
Aspekto de vinbero: sang-karmino
En densa ombr', en verdfolia sino
Por sentoj plaĉas, logas por rigard'.*

<1829>



PROBLÉME

*De mont' ruliĝe, venis ŝton' al valo
Neniu scias kaŭzon de la falo —
Ĉu mem la ŝtono falis de sur pint',
Aŭ estis fremda vol' de faligint'?
Jarcento flugis post jarcent' pretere:
Neniu solvis la demandon vere.*

<1833>

* * *

*Sur la ĉielo helas fuma stri'! —
Kaj sube ombro glitas en mallumo!..
“Jen nia vivo, — diris vi al mi, —
Ne hela fum' en bril' de lun-radi',
Sed ombro, kiu fuĝas for de l' fumo...”*

<1848 aŭ 1849>

* * *

*Senpovas ni je antaŭsci'
Pri la rezult' de nia vorto, —
Al ni kunsenton donas sorto,
Samkiel benon havas ni...*

<1869>

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

Koncize kaj konvinke

Handzlik, Georgo. *Verdeskaj pensoj: Originalaj esperantaj aforismoj. Kun multaŭtora antologio.* — Bielsko-Biala: KLEKS, 2009. — 136 p.

Verdeskaj pensoj de Georgo Handzlik estas la unua aro de kurtforme esprimitaj opinioj kaj rimarkoj pri Esperanto, esperantistoj kaj Esperanto-movado.

En la unua, 83-paĝa parto de la publikaĵo oni fiksas, kiel informas la subtitolo, “originalajn esperantajn aforismojn” de la aŭtoro mem, verkitaĵojn kaj prezentatajn publike dum multaj jaroj. Sur 50 paĝoj de la dua parto ni trovas la “multaŭtoran antologion” — trarigardon de pensoj kaj eldiroj de konataj, diversnaciaj esperantistoj.

Teoriuloj pri literaturo diferencigas ĉiujn eblajn formojn de la kurta eldiraĵo. Jen kelkaj el ili, aplikataj abunde de filozofoj kaj verkistoj dum jarcentoj:

Maksimo. Principo de konduto, veraĵo pri la vivo esprimita koncize. Ofte ĝin aplikis, ekzemple, La Rochefoucauld [Laroŝfuko].


Sentenco. Mallonga frazo enhavanta belan moralan ideon, profundan veron de la vivo. Popularaj estis iam sentencoj de Seneka, ĝis nun oni ofte citas sentencojn de Salamono.

Proverbo. Popola maksimumo enhavanta konsilojn aŭ konstatojn pri la ĝenerala, psikologia aŭ morala veraĵo.

Aforismo. Konciza, sensoriĉa eldiro esprimanta principon aŭ penson rilatantan al scienco, arto, moro aŭ kredo.

Tiuj difinoj taŭgas al la interesato, kiu volus pretigi teorianton bazon por la legado. Tamen estus troigo kalkuli, kiom da frazoj el la volumeto apartenas al tiu aŭ alia ĝenro de la kurtaj formoj. Gravus, ke la libreto enhavas ĉiujn el ili kaj plimulto povas nin pensigi kaj ĝojigi.

La menciitaj kurtaj formoj de la elparolo, allogaj kaj efektaj postulas fortan disciplinon. Sen koncizeco kaj samtempe klareco, en certaj formoj ankaŭ sen sprito ne naskiĝos atentinda penso, kiun valoras memori kaj apliki. *Verdeskaj pensoj* feliĉe sukcesis eviti kaptilojn, en kiujn povas enfali tro



loze pensantaj ŝatantoj kaj prononcantoj al tiu ĝenro.

La aŭtoro dividis la propran parton de la aro je kurtaj ĉapitroj, kies titoloj prezentas la klasikan devenon. La plej efika rekomendo estos citi kaj ĉi titolojn kaj erojn de la enhavo.

El *Dek ideoj por ne studi Esperanton* precipe konvinkas min la kvara: “Tiuj, kiuj nur bojas, bezonas ne helpolingvon, sed psikiatron”.

La pensoj el la ĉapitreto *Tra densa mallumo...* ne tro modeste sed sprite aludas al vivo de la Majstro: “Mi ege similas Ludovikon, ankaŭ mia patro diris, ke mi ne okupiĝu pri stultaj ideoj”. Aliaj prezentas scion de spertulo vivanta sufiĉe longe en la difinita socio: “Oni batalas kontraŭ malnovaj antaŭjuĝoj por starigi la novajn”, aŭ “Eĉ diojn homoj kreas laŭ la propraj ideoj”.

Amare admonas nin la ĉapitro *Plej bela lando Promesujo*: “Kelkaj eternaj ideoj mortis jam pro malsato”; “Sobra rigardo al la mondo tuj devigas min trinki glason da vodko”.

Devas plaĉi la parto titolita *Diligenta kolegaro*. Ĉiu, kiu sufiĉe longe okupiĝas pri niaj strangaj ideoj kaj vivas eĉ de tempo al tempo en nia internacia komunumo alte taksos tiajn observojn: “Havante tutan PIV en la kapo, li ne havas jam liberan spacon por pensi”; “Amikojn vi povas havi multajn, ĝis kiam vi ne intencos loĝi ĉe ili”; “Esperanto reunigas homojn, kelkaj iĝis jam infancaĵ”.

Tiklajn aferojn kunligitajn kun la

populara strebo de esperantistoj priskribas la ĉapitreto *Dumvoje al la Fina Venko*, kio povas okazi pli ĉagrena ol konsola: “Vivu la verda stel’ — ĝis kiam?”; “Li ne konas Esperanton, sed kapablas ĝin surkraĉi”; “Pioniroj: mortintaj problemfarantoj”.

La ĉapitro *Ekvilibro* precipe perverse montras diversajn homajn malbonsentojn: “Ne piedfrapu erinacon... nudpiede”; “Tio estis prospera jaro, diris... tombeja enterigisto”; “Por la kato ne gravas la musa vidpunkto”.

Virinoj estas heroinoj de la ĉapitroj *Ina Venko* kaj *In-formoj*. Ilia enhavo abundas je malicetaĵoj, sed ankaŭ je vortoj de admiro al duono de la homaro, ĉar ja: “Viro kaj virino: la samo, sed kontraŭa”; “Virino mem decidas, kiu ŝin venkos”; “Ŝi facile forgesas pri siaj sinforgesoj”; “Ĉiuj virinoj estas belaj, tamen kelkaj pli”.

Interlingvistiko praktikata alportas al ni gravajn kaj malpli gravajn konsiderojn pri lingvoj, ties praktikado kaj eblecoj interkompreniĝi. “Malgrandaj homoj ofte krias grandajn vortojn senenhavajn”; “Ju pli da interhomaj kontaktoj, des pli da miskomprenoj”; “Esperanto ŝanĝis lian vivon, kiam la edzino komencis... legi liajn E-leterojn”; “Ankaŭ por kvereloj necesas komuna lingvo”.

La ĉapitreto *Nia unika kulturo* verŝajne entute nekomprenebla, se ni strebus traduki ĝin al iu ajn lingvo, povas doni al esperantistoj multe da kontento. “Ĉiu havas sian Beaufront”; “Esperantisto: ĉiu persono, kiu uzas la internacian lingvon por kiu ajn celo, eĉ por idigi ĝin”; “Eĉ la *Ŝlosilo de Esperanto* ne efikas, se la seruro rustas”; “Fosante sian sulkon li ne rimarkis, ke li ŝpatas la propran tombon”.

La partoj *Malproksimaj konatoj*, *Rapida kurso pri vivo*, *Mi parolas kun rapido*, *Vidpunktoj*, *Sinonimoj* kaj *Verdire* abundas je konstatoj rilatantaj al la vivo ĝenerale: “Ne instru al birdoj flugi”; “Mi estas tolerema, se aliaj obeas min”; “Ju pli granda vizitkarto, des pli eta posedanto”; “Kial oni ne punas ŝtelistojn de la tempo?”; “Se vi ŝatas rozojn, al kutimiĝu al dornoj”.

Al la Esperantaj aferoj revenas la aŭtoro en ĉapitreto *Niaj UK-oj*. La partoprenantoj de ĉi tiuj ĉiujaraj

kongresoj scipovas apreci agacajn observojn kaj spritajn, ne tro malicajn pikojn: “Dum UK oni parolas nur esperante — ĉu manko de toleremo?”; “Oni povas koni esperantistojn kaj malgraŭ tio ŝati Esperanton”; “La kongresanoj danke aplaŭdis lin pro la parolado, kiun li ne faris”; “Li paŝis la vojon celitan, sed en misa direkto”; “El teatra programo: Li naskiĝis en 1961; Ŝi naskiĝis en Zagrebo”.

La lasta aŭtora ĉapitro estas ŝerca kompletigo de la *Plena Ilustrita Vortaro*. La terminojn kompreneble li ordigis laŭalfabete. Jen kelkaj el ili: “Bumerango: Ĵetilo, kiu al kutimiĝis al la ĵetanto”; “Dankemo: Plej efemera el la sentoj”; “Idioto: Homo, kiu opinias malsame ol mi”; “Kongresa libro-servo: Loko, kie kuŝas libroj kaj oni vendas bildkartojn kaj globkrajonojn”; “Samideano: Homo, kies ideoj tute ne gravas”.

Bona koncepto estis kompletigi la pensaron per verkoj de antaŭuloj de la aŭtoro. Kun vera interesiĝo kaj ne rare kun raviĝo ni ekkonas aŭ relegas orajn kaj verdeskajn pensojn de la Majstro mem kaj de aliaj elstaraj literaturistoj — Julio Baghy, Raymond Schwartz, Claude Piron, William Auld, Marjorie Boulton, Vinko Oŝlak, Mikaelo Bronŝtejn, Spomenka Ŝtimec. Kaj ankaŭ de multaj aliaj, kiuj por instrui vivon aŭ ridigi ne bezonas verki romanojn.

Ĝue ni memoros, ke “Trinki brandon el respektinda kafotaso povas trompi viajn najbarojn, ne vian hepaton” (Schwartz); “Nin oldigas ne jaroj, nur pensoj malgajaj” (Bronŝtejn); kaj “Kiso, pri kiu oni rezignas, daŭras eterne...” (Oŝlak).

Tutcerte la fama alvoko de Izrael Lejzeroviĉ “Aĉetu la verdajn librojn, eĉ se vi ne volas legi ilin” ne taŭgas por *Verdeskaj pensoj* de Georgo Handzlik. Kun sinceraj gratulaj vortoj pro la pripenso kaj realigo de ĉi tiu libro mi emas certigi la aŭtoron, ke lia verko estos aĉetata kaj legata... eĉ kelkfoje.

Lidia Ligęza

Ne forgesu
(re)aboni

Tre utila libro el Katalunio

Història de l'Esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro: Artikolkolekto / Kompilis Francesc Poblet i Feijoo, Hèctor Alòs i Font, Sabadell: Kataluna Esperanto-Asocio, 2010. — 471 p.

Impona artikolaro aperis ĉi-jare omaĝe al la centjara jubileo de la Kataluna Esperantista Federacio kaj al la tridekjara datreveno de ĝia postulo: Kataluna Esperanto-Asocio. La nuna asocio aktive partoprenas en la socia vivo kaj la radikojn de tio oni facile spuras en la pasinteco. Ankaŭ ĉi tiu eldonaĵo de KEA estas dulingva: kataluna kaj Esperanta, kaj tio ebligas konatiĝon kaj al la internacia esperantista legantaro, kaj al la katalunlingva publiko, interesiĝanta pri la internacia lingvo kaj/aŭ historio de sociaj movadoj. La libro trovos sian lokon ne nur en Esperanto-bibliotekoj, sed ankaŭ en publikaj kolektoj.

Francesc Poblet i Feijoo kaj Hèctor Alòs i Font, kolektis 21 artikolojn de 14 aŭtoroj. Estas interese, ke 16 artikoloj estis verkitaj katalune, iujn la aŭtoroj mem tradukis al Esperanto. Ĉar la celpubliko de tiuj artikoloj estis ĉefe neesperantista, foje oni renkontas klarigojn superflujajn por la esperantistoj. Aliflanke, tio montras la manieron prezenti iusence internan, esperantistan aferon al la ekstera publiko.

La libro konsistas el tri blokoj kaj apendicoj.

La unua sekcio *Temaj studoj* enhavas ok artikolojn. Kvar el ili aŭtoris Francesc Poblet, lia artikolo *Serĉante universalan lingvon: La esperantista movado en Katalunio* enkonduke malfermas la kolekton. Lia *Esperanto kaj anarkiismo en Katalunio* skizas rilatojn inter Esperanto kaj anarkiismo, kaj pli vaste laborista movado. Mallonga artikolo prezentas la malfacilan sorton de la *Kataluna Esperantisto*. Al tre grava epizodo en la historio de la kataluna Esperanto-movado koncentriĝas *La kongreso en Vinaròs: La subpremado de la kataluna esperantomovado dum la diktaturo de Primo de Rivera*, kiam politikajn persekutojn spertis kaj la organizaĵo kun sia organo, kaj la aktivuloj. Krome, Poblet kunaŭtore kun Hèctor Alòs rakontas

pri la literatura aktiveco de katalunaj esperantistoj, kiu kulminis per eldono de *Kataluna Antologio* en 1925.

Xavier Margais parolas pri malheltoj kiuj baris al alilandanoj partoprenon en la kongreso de SAT en 1934 en Valencio. Abel Montaugut montras la lokon de Esperanto kaj subtenon al ĝi en diversaj sociaj organizaĵoj kaj rondoj, de aŭtoritatoj kaj komercaj unuigoj dum la jarcenta ŝanĝo (de 1898 ĝis 1909). La lasta kontribuo de la bloko estas *La utiligado de esperanto dum la hispana intercivitana milito*, en kiu Toño del Barrio kaj Ulrich Lins skizas la panoramon de la hispania Esperanto-movado meze de la 1930aj jaroj, aktivulojn de esperantistoj komence de la milito, partoprenon en la Internaciaj Brigadoj, uzon de Esperanto por propagando, persekutojn kaj enkarcerigon post la fino de la milito.

Lokaj studoj estas la dua bloko kun ok kontribuoj pri ekesto kaj disvolvado de Esperanto-aktivado en Ceret, Rusiljono, Maó, El Vendrell, Vilanova i la Geltrú, Majorko, ankaŭ pri la laborista Esperanto-movado en Valencio kaj pri Esperanto en la Popola Enciklopedia Ateneo de Barcelono.

La lasta bloko, plej mallonga, *Biografiaj studoj*, prezentas personecojn de kvin elstaraj katalunaj esperantistoj: Frederic Pujulà i Vallès, Joan Amades, Delfi Dalmau, pastro Joan Font i Giralt kaj Joan Mascaró.

Apendice aperas *Baza bibliografio, Glosaro, Demografio* kaj la tre utila *Kronologio*, kiu donas paralele la plej gravajn eventojn en la Kataluna Landaro kaj en Esperantujo. Mi rekomendas al la nekatalunaj legantoj esperantistaj unue tralegi la *Kronologion* por pli bone hejmiĝi en la priskribata historio. Kaj tute fine estas prezento de la dek kvar artikol-aŭtoroj.

Ĉi volumo estas la tria dulingva libro pri la historio de la Esperantomovado en la Katalunaj landoj, eldonita de KEA. Ĝi sendube altiros atenton de lokaj historiistoj kaj instancoj por instigi al pliaj esploroj, kiujn povas ebligi stipendioj. Ekzemplo estas la ĉi-jara stipendio (3000 eŭroj) al Gisela Alcón por esploro pri esperantistino Maria Julivert el El Vendrell, rezulte devos aperi libro minime 100-paĝa.

Halina Gorecka

Sur kampo granita

Kiam la kvanto da libroj produktitaj de István Nemere ne superis ankoraŭ kvincent, eble eĉ ne (!) cent, la aŭtoro loĝis en ĉarma domo de la malnova Esztergom, fore de la ĉefurbo. Li ne havis telefonon kaj, se li volis kontaktiĝi kun la ekstera mondo, li mem devis vojaĝi. Tiam li vojaĝis multe, plej ofte al Budapeŝto aŭ al Pollando.

Komence de la 1980aj Nemere produktis du nelongajn romanojn kaj hungare kaj esperante: *La blinda birdo* kaj *Sur kampo granita*. Li verkis ilin en ambaŭ lingvoj, kiel li klarigis en intervjuo farita de György Nanovfszky por *Literatura Foiro* (1984, №84):

«Mi niam tradukas miajn kreaĵojn: vere ili estas ĉiam originale verkitaj. Tial povas okazi ke la hungara versio ne kongruas laŭvorte kun la esperanta. Mi simple reverkas la temon en la alia lingvo».

Sur kampo granita rakontas pri altranga oficisto de la Ruĝa Kruco, eksgermano kiu svisiĝis, estinte militkrimulo. Ĵurnalistoj ĵus malkovris tion kaj, antaŭ ol esti arestita,

Nemere, István. *Sur kampo granita*: Originala romano. — Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. — 127 p.



li fuĝas al la itala vilaĝo (ĉu Marzabotto?), kie li mortpafigis senkulpajn kamparanojn pro reprezentado. Li deziras klarigi, al la pretrevivintoj kaj al la nunaj vilaĝanoj, kiel li fariĝis krimulo.

Suzanne Bourot difinis la romanon psikologia, pro la demandoj kiujn ĝi levas. Ĉu la protagonisto mem kulpas aŭ nur la cirkonstancoj? Ĉu li povintus agi alimaniere? Kaj tiel plu. Sed ŝi sentis sin “streĉita, angorplena kaj kelkfoje kolerema pro la granda egoismo, kiu konstante aperas en la vivo de la protagonisto, en lia persona (rilate al la virinoj) aŭ publika vivo”.

Vilmos Benczik, gvidanta la eldonejon (kiu nomiĝis Hungara

Esperanto-Asocio), inter la ĝis tiam kvin esperantlingvaj libroj de Nemere preferis ĝuste *Sur kampo granita*, laŭ propra deklaro dum restoracia interparolo en Budapeŝto. Laŭ Benczik, temis pri la plej streĉa. Efektive, la tuta romano disvolviĝas en nur unu punkto; kio donas, grandparte, la kadencan de tragedia unueco, laŭ tempo, loko, agado. Perla Martinelli, kiu partoprenis la konversacion, trovis la aŭtoron tro indulgema rilate la protagoniston, kaj Vilmos Benczik komentariis ke tio estas tipa de la virinoj: ili ne pardonas. Nu, la literatura kritikisto estas esperanta, sed la penso... hungara.

Mi ne povas diri ĉu *Sur kampo granita* estas la plej elstara romano de Nemere (sed ni konsideru ke Benczik parolis nur pri lia frua produktado). Probable li donis la plejbonon de sia prozo en la koncizaj noveloj de *Krokize de mia ĝardeno* (1992), interalie ĉar li tie evitas la normon kiu inspiras la elekton de liaj intrigoj. Nome, István Nemere ne havas preferatajn aŭ karakterizajn temojn: post tre junaĝa flirtado kun sciencfikcio, li kutimis elekti temon ligitan al la aktualeco, kaj super ĝi ŝpicias verkon. La demando pri rasismo en segregacia societo, grava ekologia problemo, terorismo, militkrimuleco, mafioj kaj tiel plu inspiris lin, ĉiam kun zorga evito pri tro precizaj referencoj.

La demando pri Martin Dregger en *Sur kampo granita* estas, ĉu eblas absolvi lin, kaj kial. Se la Tria Regno estus venkinta, li entute ne estus procesebla. Sed ĉu li estas procesebla nur ĉar lia partio aŭ lia armeo malgajnis? Ĉu ne ekzistas historia vero kaj historie atesteblaj valoroj? Ne ĉiu germana militisto akceptis la naziismon ĝisfunde: kelkaj havis la kuraĝon ribeli, kiel grafo Stauffenberg, ĉar nazieco plej makule kompromitis la honoron de la germana armeo.

De *Sur kampo granita* oni ne atendu tro multe, ĉu stile ĉu filozofie. Ĝi estas tre pensinstiga romano. Kaj tio jam sufiĉas por atenti pri ĝi.

Giorgio Silfer



Tiu ĉi historion elpensis ne mi, sed mem la vivo. La monda gazetaro en 1968 informis, ke oni demaskis certan Matthias Defregger, helpepiskopon de Munkeno, katolikan pastron, kiu dum la dua mondmilito en itala montara vilaĝo — kiel leŭtenanto de la germana armeo *Wehrmacht* — ordonis mortpafi multajn kamparanojn. Episkopo Defregger post la demaskado decidis veturi al Italio kaj mesi en tiu vilaĝo — sed la oficialuloj de Vatikano, timantaj plian skandalon, veturigis lin al iu monaĥejo. Ekde tiam oni ne plu aŭdis pri li.

Mi iom ŝanĝis la historion, ĉar pleje min interesis, kion estus faranta M. D., se tamen li estus alveninta al la loko de sia iama krimfaro? M. D. en mia historio ja ne estas katolika ĉefpastro, sed — same kiel en la reala vivo — li estas homo strebanta esti bonulo. Ĉu la nuna bono povas forgesigi la iaman kulpon?..

István Nemere

Beletra Almanako, junio 2010



En la junia kajero de *BA* originala prozo estas prezentita per *Paŭzo en la stacidomo Union* de Philip Brewer, 1968 de Mikaelo Bronštejn kaj *La karakteroj de Jean-Baptiste* de Grigorij Arosev, aperinta unue ruslingve en la kolekto *Novaj verkistoj 2009*.

En la traduka prozo situas *Dialogeto* de Krzysztof Usakiewicz kaj parolado de Frigyes Karinthy en la 10a kongreso de Internacia PEN-klubo (hungara). En la traduka poezio oni trovas du poemojn de Ĝorĝ Pisani (trad. el la malta Carmell Mallia).

La eseo de Ricardo Felipe Albert Reyna *Kajero kaj eroj de universala kongreso* temas pri la Bjalistoka UK, kaj ĝia beletra kvalito lasas ĝin ĝuebla post paso de pliaj UKoj. Sur pli ol trideko da paĝoj Árpád Rátkai konsideras la rilatojn inter la beletra rondo de grava hungara revuo *Nyugat* kaj internaciaj lingvoj. En *Liberlando kaj liteRETuro* Radek Nowakowski fokusiĝas al reta literaturo. Humphrey Tonkin revenas al la eventoj ĉirkaŭ la jaro 1974 en “*Generale parolante*” — *Lapenna kiel gvidanto kaj oponento*. Gonçalo Neves omaĝas al José Saramago. Memore al Higinio García reaperas lia originala *Fina ekzameno* kaj fragmento de traduko el Borges.

Negranda parto kun la originala poezio en *BA-8* omaĝas al Aira Kankkunen kaj Nikolajs Ĉulitis. Timothy Brian Carr aperas per kvin versaĵoj kiel aldono al lia libro *Yvonne*. Po kelkajn poemojn proponas Carmel Mallia kaj Jorge Camacho.

En *Debato* aperas kelkaj mallongaj tekstoj. La recenza fako, kiel kutime, grandas kaj gravas — sur 40 paĝoj estas recenzataj dek libroj. *Vojaĝo al kuniĝo. Konfeso de seksobsedito* de Darik Otira havas eĉ du recenzojn: masklan de Valentin Melnikov kaj inan de Cindy McKee. Aldone, Pascal Dubourg Glatigny intervjuas la pseŭdoniman aŭtoron de ĉi tiu romano.

Tra la tuta 165-paĝa almanako paradas fotoj de Sherrilene Bownes kun la originalaj *Ĉiel-arkaj bobeloj* kovropaĝe.

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Bronzetti, Giorgio. *Kiel profesie informadi pri Esperanto?* — Chieti: Disvastigo, 2008. — 18 p. — [Aĉeto].

Gvidlibro 2010 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2010. — 96 p., il. — [Donaco de UEA].

Handzlik, Georgo. *Verdeskaj pensoj*: Originalaj esperantaj aforismoj. Kun mult-aŭtora antologio. — Bielsko-Biała: KLEKS, 2009. — 136 p. — [Recenzoekzemplero].

Història de l'Esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*: Artikolkolekto. / Red. Francesc Poblet i Feijoo, Hèctor Alòs i Font. — Sabadell: Kataluna Esperanto-Asocio, 2010. — 471 p. — [Recenzoekzemplero].

Jarlibro 2010 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2010. — 286 p., il. — [Donaco de Halina Gorecka].

Opdag Esperanto. Et medrivende sprog: [Dana versio] / Trad. el Esp. Partizán-ske: E@I, 2009. — 11 p., il. — [Donaco de Peter Baláž].

Pausewang, Gudrun. *Pacakontoj* / Trad. el la germ. Nora Caragea. — Frankfurt am Main: N. Caragea, 2009. — 64 p., il. — [Donaco de Nora Caragea].

Rosegger, Peter. *La trovo de Ameriko*: Kvinlingva legendo / Trad. Walter Klag, Lenke Szász, Renata Chassard, Piet Schuil, Ken Miner. — 2a eld. — Vieno: Klag, 2010. — 20 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Uptäck Esperanto. Ett fascinerande språk: [Sveda versio] / Trad. el Esp. Haldo Vedin, Gunnar Gällmo, Kerstin Rohdin, Karl Gustaf Gustafsson, Inga Johansson. Partizán-ske: E@I, 2009. — 23 p., il. — [Donaco de Peter Baláž].

Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako. 2010/8; Esperanto ektuell. 2010/4; Esperanto en Danio. 2010/4; Esperanto. 2010/9; Frateco. 2010/89; Heroldo de Esperanto. 2010/8,9,10; Informilo por Interlingvistoj. 2010/74; Kataluna Esperantisto. 2010/353-354; Kontakto. 2010/3; La Gazeto. 2010/149; La Movado. 2010/714; La Ondo de Esperanto. 2010/8-9; La Revuo Orienta. 2010/7; Literatura Foiro. 2010/245; Monato. 2010/8-9; Scottish Esperanto Buletin. 2010/2; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2010/3.

Literatura Foiro, 2010, №245

En la 245a *Literatura Foiro* (junio 2010) originala poezio uverturas per hajkoj de Nula Horo, inspiritaj de poemo de Miguel Hernández, kaj interludas per tri lirikaĵoj de Lina Gabrielli.

La revuo daŭre prezentas la postsekvajn de la jaro 1989: en ĉi tiu kaj la sekva numeroj prof. Katharina Raabe el Berlino spuras la evoluon de la orienteŭropaj literaturoj post la falo de la Berlina muro.

Mondliterature, Zdravko Seleš recenzas la esperantigojn de la komedio *Onklo Maroje* de Marin Držić (Marino Darsa); Aloísio Sartorato tradukas la rakonton *La arto aŭskulti* de Rubem Alves; kaj László Radácsy la radiofonion *Punkto-fino* de József Mihály Benedek.

Aktualas la prelego de Giorgio Silber dum la PEN-konferenco en Bled pri la globaliĝo kaj diasporoj. Carlo Minnaja profunde recenzas la omaĝlibron pri prof. István Szerdahelyi. Zamenhofologie kontribuas Bert Boon, prezentante la enigman odiseadon de letero de la Majstro.

La numero aperigas la laŭdacion de Perla Martinelli pri la forpasintaj kooperantoj de LF-koop, okaze de la Tago de Ĉiuj Pioniroj. Ĝi informas pri tri Esperantaj kulturaj jubileoj en Razgrado. Koncerto de Elton John estas la temo de Ljubomir Trifončovski kadre de la rubriko *Kultura agendo*.

La kolora kovropaĝo daŭrigas la ĉi-jaran akcenton al la legantinoj, per klasikaj bildoj de mondfamaj pentristoj: en LF 245 “gastas” Charles Sprague Pearce (1851–1914).

La revuon *Literatura Foiro* posedas, eldonas kaj administras LF-koop; ĝi estas ankaŭ la organo de Esperanta PEN-Centro.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la julia tasko venis 18 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Andreo Kirienko (Belorusio), Brian Bishop, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Marek Blahuš, Jindřich Tomášek (Ĉeĥio), Bruno Lehtinen (Finlando), Jackie Huberdeau (Francio), Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka, Stanisław Płachta, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Viktor Alikin, Svetlana Konjašova, Vladimir Romanov (Ruslando), Birgitta Anevik kaj Karl-Gustaf Gustafsson (Svedio), Niko Kalivoda (Usono).

La solvo de la enigmo estas: “Akiro kaj perdo rajdas duope. Nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas”.


La loto donis libropremion al *Vladimir Romanov*. Ni gratulas lin!

Oblikva krucoartenigmo

1. Senargumenta veraĵo; 2. Preĝeja bildo; 3. Anatomio en geologio; 4. Kuraca herbo, kiun oni uzas por plimoligo de tuso; 5. Ilo por fiksi ŝipojn; 6. Malbena por herezulo; 7. Montaro, kie naskiĝas Amazono; 8. Lando, kiu eksportas persajn tapiŝojn; 9. Granda antikva kuracisto; 10. Damaĝa okazaĵo; 11. Marĉa brulaĵo; 12. Hobio de angla reĝo Henriko VI; 13. Usona ŝtato, kiu situas sur duoninsulo; 14. Lando, kie aperis la unua papera mono; 15. Manĝaĵo por kokcinelo; 16. Simbolo de germana urbo Lepsiko.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de novembro 2010.

Kompilis **Viktor Alikin**



Anekdotoj el Pollando

Viro diras al sia kolego:

- Ni iru gratuli Petron. Bebo naskiĝis al li.
- Kaj kion li havas?
- Ĉampanon!

- Karulo, forĵetu balaĵojn!
- Mildiable, mi ĵus sidiĝis.
- Kaj kion vi faris ĝis nun?
- Mi kuŝis.

Tradukis membroj de la Esperanto-Klubo en Olsztyn

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Corsetti sen alternativo

... la problemo estas ke ne ekzistas alternativo al la finvenkismo. (Renato Corsetti, 2 mar 2010, groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5283)

Corsetti: Revon havas mi hodiaŭ

Mi revas pri tempo, en kiu UEA ne plu aranĝos Belartajn Konkursojn... (Renato Corsetti: Jaro 2009: Niaj atingoj kaj fiaskoj // *La Ondo de Esperanto*, 2010, №2, p. 5)

... Corsetti apenaŭ verkis atentindan beletron ... (Jorge Camacho, 20 mar 2008, komento en *Lingva Kritiko*, lingva-kritiko.com/2008/03/03/el-interna-kaj-el-ekstera-vortprovizo-analizo-de-la-diskuto)

Asocioj sangosuĉaj?

Ĉu kupas B[rita] E[speranto]-[A]socio ĉu UEA mi ne scias, kaj ne volas scii, sed ni devas provi transformi tiun sintenon.

(Renato Corsetti, 19 dec 2009, groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/16121; **kupo**. Malgranda kloŝeto el vitro... por altiri... la sangon, NPIV)

Ĉi-tere ĉio pasas senrevene

La Kongreso de serbaj esperantistoj okazis kaj pasis.

(Renato Corsetti, 8 jul 2009, groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/13760)

Malĉeesta UN-jaro

[Pri la UN-temoj de la jaro 2011:] Momente la inform-bazo de UN parolas pri forestoj kaj ĥemio. (Renato Corsetti, 18 jan 2010, groups.yahoo.com/group/agado-ĉe-unesko-kaj-UN/message/1292)

Kara Renato 1, aŭ: Kiuĵ estras, kiuĵ restas?

Kara Renato: Dankon pro via gratulmesĝon kiun mi transdonos al la restantaj membroj de la estrato de K[ataluna] E[speranto]-A[socio]... (Josep Franquesa i Solé, 28 okt 2008, groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/4140)

Kara Renato 2, aŭ: Alia naz' pro l' sama nazkataro

Renato, vi tuis unu el a plej trafaj demandoj de le farado de novaj vortoj en Eo. (Tomaž Longyka, 10 sep 2007, [tech.groups.yahoo.com/group/tradukado/message/4272](http://groups.yahoo.com/group/tradukado/message/4272))

Kara Renato 3, aŭ: Tra eta aperturo

Kara Renato Corsetti... vi nun aktivis en ESPERANTO EN EVOLUO, ĉu vi povas anonci publike pri tio? (Moliere Ngangu, 12 feb 2010, yahoo-listo per-esperanto-turismo; rimarkis Lu Wunsch)

Ĉu halucino aŭ revelacio?

La vizio pri nia estonteco (artikolo de Barbara Pietrzak, Probal Dasgupta, Renato Corsetti // *Esperanto*, 2009, №12, p. 243; rimarkigis Ramon Perera)

Plukis **István Ertl**

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530




Vjetnamio. Kvankam la LKK de la 97a UK, okazonta post du jaroj en Hanojo, ankoraŭ ne estas oficiale aprobita, ĝi jam vikle laboras, kaj tion spertis la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj KKS Clay Magalhães, kiuj vizitis Hanojon komence de septembro, vd. p. 6. (*Clay Magalhães*)




Pollando. Ankaŭ ĉi-jare Esperanto estis forte sentebla en la 20a Ekonomia Forumo, okazinta 8–10 sep en Krynica (vd. p. 5). Danke al la kunlaboro de EEU kaj PEA estis aranĝita panel-diskuto kaj konstanta informbudo en kiu deĵoris la prezidantino de PEA, Halina Komar, kaj PEJ-aktivuloj. (*Peter Baláž*)




Ĉinio. La 26an de junio 2010 finiĝis Esperanto-kurso en la Oficejo de Esperanto de la ĉina urbo Kantono. Agrabla etoso regis. Fine de la lasta klaso okazis bankedeto, agrabla kaj amuzo. Ĉiuj promesis denove rekomenci la lernadon de Esperanto, kiam komenciĝos la nova lernoĵaro. (*Augusto Casquero*)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*
Serio *Scio*, Volumo 9
64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*
Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6
168 paĝoj, 15 eŭroj



Dek libroj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1
32 paĝoj, 4,50 eŭroj



Dek gazetoj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2
32 paĝoj, 4,50 eŭroj